

NiaBulteno

ISSN:0871-9241

JULHO 2008 - SETEMBRO 2011 • JULIO 2008 - SEPTEMBRO 2011 • Numero 91

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-ªA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.pt • www.esperanto.pt

25-a RPEspinho oktobre 2011


Post 3 jaroj revenas, kiel NB!
Tre baldaŭ, ekpaku tuj! pĝ.5

Lejrio invitas al Z-festo 2011

Decembre, landcentre: pĝ.4

Revenis nia vico: 2012 Sezimbrogastigos IROn

La naŭan okazigon de tiu
ĉi iberia aranĝo organizas
PEJ jam la trian fojon, post
Blanksablo kaj Oporto: pĝ.3



Vortarojn ree eblas mendi, &pli!

Post bremsiĝo, la eldona
fako de P.E.A. relanĉiĝas
per kvar pretaj titoloj kaj
ambicia plano: pĝ.30,32



«Elstare figuras» (...) «la nelacigebla, konstanta sekretario.
Ni »ŝuldas« al ŝi varman elmontron de nia dankemo.»
(estrarprez. Aldolfo NUNES, 1977.06.26, 5-a R.P.E. NB17:3) pĝ.17

**Curso semanal na sede:
Esperanto nvel1**

Inscrições abertas. Pĝ.25,36

**Sidejkurspropono
kaŭzas kverelon!**

Inter 5 Ĝ.A.-raportoj: pĝ.22

Katalogo de la Libro-Servo jam haveblas!

pĝ.30

Vortoj mankas — kiuj esprimus originale mian penson okaze de jen plia rekorde malfrua eldono de nia bulteno. Relegu eble ĉi saman spacon en *NB90*: Ja similas la konsideroj kaj samvaloras la situacio kaj la sentoj, la defioj kaj la ŝancoj. Bonvenigon, do, kaj apogon — vortmanke ripete petas via *red.*



Portugala
Esperanto-
Asocio
Associação
Portuguesa de
Esperanto

(pessoa colectiva de utilidade pública)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359 ☉
☎ +351 217 933 924 (pre-av.)
✉ <info@esperanto.pt> (português)
✉ <asocio@esperanto.pt> (esperante)
🌐 <http://www.esperanto.pt/>
📧 <pea_diskut@googlegroups.com>

CAE: 91331 NIF: 501 547 312
Fundita en 1972.04.25
Landasocio de U.E.A. ekde 1979
Kom.-Obs.: Faria de Bastos
Membroj: 128(+54) en 2011.09.02
Monata kotizo: 3,00 €
(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:
2,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)
Aniĝkoto: 5,00 €
Pagojn al bankkontoj:
(BIC: CGDIPTPL) IBAN: PT50
0035 064 000 025 961 430 49 aŭ
NIB: 0035 064 000 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2011.03.26)
General-Asemblea Stabo:
<assembleo@esperanto.pt>

Prezidanto: Alexandra PAZ
Sekretarioj: Rui Q. VALÉRIO
Francisco MELO

Estraro: <estraro@esperanto.pt>
Prezidanto: José MARTINS
Vicprezidanto: Wilson BRÍGIDO
Sekretario: <sekretario@esperanto.pt>
Iuri GASPAS
Kasisto: <kasisto@esperanto.pt>
Vitor MARQUES
Voĉdonantoj: Luís OLIVEIRA
A. MARTINS-Tuválkin
Nuno MAGALHÃES

Kontrol-Komitato: <kk@esperanto.pt>
Prezidanto: A. da Silva ALMEIDA
Revizoroj: Alcino ALVES
Miguel BOEIRO

NEBALOTITAJ POSTENOJ:

Lernado: <lernado@esperanto.pt>
Nádia PENAS
Alexandra PAZ
Libro-Servo: <vendejo@esperanto.pt>
Rui Q. VALÉRIO
Biblioteko: <biblioteko@esperanto.pt>
Wilson BRÍGIDO
(periodaĵoj) Wilson BRÍGIDO
(eltondajaĵoj) MARTINS-Tuválkin
(diversaĵoj) (vakas)
Gazetaro: <imprensa@esperanto.pt>
(vakas)
Eldonoj: <eldonoj@esperanto.pt>
A. MARTINS-Tuválkin
Subvenioj: (vakas)
Ekspozicioj: (vakas)
Komputservo: <admin@esperanto.pt>
Nuno MAGALHÃES
Luís OLIVEIRA
A. MARTINS-Tuválkin
Fotarkivo: (vakas)
Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES
Postmarkoj: Armando CARDOSO
HONORAJ MEMBROJ:
António da SILVA ALMEIDA
Alsácia Fontes MACHADO ☐
Manuel de FREITAS ☐
Alberto Pedro da SILVA ☐
Adelino Franco SIMÕES ☐
Manuel de Sousa TEIXEIRA ☐

JUNULARA SEKCIO:
Portugala Esperanto-Junularo
Jovens Esperantistas de Portugal
Fond.: 1993 **Membr.:** 16
(L.S. de TEJO ekde 1996)

🌐 <http://www.esperanto.pt/pej.htm>
✉ <pej@esperanto.pt>
☎ ☎ ĉe P.E.A.

LOKAJ SEKCIOJ:
PLUS — Portugala Loka Unua
Sekcio (nordokc. sekcio; neag.)

Repr.: Nuno MAGALHÃES
Fond.: 2002 **Membr.:** 22
☉ Kafejo Estrela d'Ouro, str. Fábrica, Oporto (antaŭavertul!)
✉ (provizore ĉe P.E.A.)
☎ +351 917 721 868
✉ <plus@esperanto.pt>
🌐 <http://www.esperanto.pt/plus.htm>

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 91 (jul. 2008 - sep. 2011)
ISSN:0871-9241

Redaktis:
António MARTINS-Tuválkin
Reviziis: Gonçalo NEVES;
Iuri GASPAS; A. S. ALMEIDA
Eldonkvanto: 300 ekzempleroj
Abono (4n-roj, nur al ekster PT):
½ de via landa M.A. de U.E.A.
Unuopa ekz. (88-91): 5,00 €
Refe: <http://www.esperanto.pt/dok/nb091.pdf>
Finkompostita en: 2011.08.31
Limdato por NB92: 2011.10.03
Kontakto: <bulteno@esperanto.pt>

ALIAJ LANDAJ ORGANIZOJ: La Karavelo : esperanto-editejo

🌐 <http://www.lakaravelo.pt/cc/>
✉ <lakaravelo@gmail.com>
✉ Cx. 3003; Fonte Velha;
PT-7100-078 ESTREMOZ
☎ +351 218 127 801

Regiona Esperanto-Asocio (Ourém)

🌐 http://www.freguesia-pedreiras.pt/index.php?option=com_content&view=category&layout=blog&id=57&Itemid=77
☎ ☎ (anoncotaj; pĝ.4)

**Saluton! — Cooperativa dos Amigos
do Esperanto e da Natureza**
☎ ☎ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACCOVA

LANDAJ PREZENTANTOJ:

U.E.A.: Manuel PINGUINHA
TEJO: Nuno MAGALHÃES (A-kom.)
E.E.U.: Luís LADEIRA; José MARTINS
ILEI: (vakas)
ILERA: Francisco MELO (CTICGE)
EJA: Faria de BASTOS
SAT: Pedrosa ALVES (kotizp.)
IKEK: Alcino ALVES
IKUE: Salete dos SANTOS
TEVA: Olga ALMEIDA ☐
SEL: (vakas)
IKEL: (vakas)

NUMEROJ KAJ REFERENCJ

Ekz.: «NB12:3-4» indikas pĝ. 3
ĝis 4 de Nia Bulteno n-ro 12.
Same: IL (Informa Letero); LK
(La Karavelo); NS (Nia Stelo);
ELV (Esperanto — Lingua Viva);
RPE (Revista Portuguesa de Espe-
ranto); SI (Saudação Informilo).
Sign. de logotipo kun numero:
★1234/567 aŭ ★1234: asociano;
★12.345: vara mendkodo (L.S.);
Bibl.: ★B1234 aŭ ★BA123: libro;
★i123: periodaĵo; **albumo:**
★f1234: foto; ★G1234: eltondajo.



La 9-a IRO, Iberia Renkontiĝo (pĝ. 7), okazos la trian fojon en Portugalio en 2012, la unuan semajnfino de aprilo (okcidentkristana Pasko: 2012.04.05-08) en la apudlisbona ĉemarklifa fiŝhavena kastelurbeto Sezimburo (*Sesimbura*; iame *Cezimbura*). La programon, kiel kutime, prizorgas la komuna trikapa organizantaro de HEJS, KEJ, kaj PEJ, ĉi lasta la lokajn aranĝojn. Krom (anoncotaj) kulturaj/distrataj eroj, enviciĝas jam promenoj al la loka naturparka montaro *Arrábida*, al la urbeto kastelo kaj survojaj vidindaĵoj, kaj al la apuda klifa terpinto *Cabo Espichel*. Ne mankos ja plaĝumado kaj eble vizito al apudaj submaraj kavernoj kaj izolaj strandoj. Malgraŭ tio ke IROn organizas junularaj sekcioj, ĝin ĉeestas **esperantistoj ajnaĝaj**, kaj praktikemaj komencintoj estas aparte **bonvenaj**. Sciigu tuj vian principan aniĝon al iro@esperanto.pt kaj eksciu dumajn novaĵojn ĉe <http://esperanto.pt/iro2012/>. **AMT**

BULTENO:

Uzataj mallongigoj:

a.k.k.: «ankaŭ konata kiel» **b.v** «bonvole», «bonvolto» **ĉ.** «ĉirkaŭ» **ekz.:** «ekzempl-o/e/a»; «ekzemplero» **i.a.:** «interalie», «inter aliaj» **i.m.a.:** «inter multaj aliaj», «inter multo alia» **k.a.:** «kaj aliaj» **k.c.:** «kaj ceter-e/aj» **k.m.a.:** «kaj multaj aliaj» **kp.:** «komparu» **k.s.:** «kaj simil-e/aj» **k.t.p.:** «kaj tiel plu» **n-ro:** «numero» **pĝ.:** «paĝo/f» **p.t.m.:** «posttagmeze» **t.e.:** «tio estas» **t.k.e.:** «tuj kiam eble» **t.n.:** «tiel nomata/f» **vd.:** «vidu»

Sigloj de movadaj organizoj:

ILEI: Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj **HEF:** Hispana Espe-

ranto-Federacio **HEJS:** Hispana Esperantista Junulara Organizo **KEA:** Kataluna Esperanto-Asocio **KEJ:** Kataluna Esperanto-Junularo (L.S.: libro-servo) **P.E.A.:** Portugala Esperanto-Asocio **PEJ:** Portugala Esperanto-Junularo **TEJO:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo **U.E.A.:** Universala Esperanto-Asocio

Sigloj de movadaj eventoj:

I.J.K.: Internacia Junulara Kongreso (**G.A.:** Ĝenerala Asembleo) **HEK:** Hispana Esperanto-Kongreso **K.K.E.:** Kataluna Kongreso de Esperanto **R.P.E.:** Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj **U.K.:** Universala Kongreso

ASOCIO:

Grupmigro

Laŭ indiko en **NB90:14**, regis malkontento pri la teknikaj ecoj de la retejfasado de *Yahogroups*, la servo kiu gastigis niajn retpoŝtajn dissendilojn kaj forumojn jam depost 2001 (laŭvice kreitaj `pea_diskut`, `pea_anonc`, `pea_estrar` kaj `pea_inform`).

Finfine, frue en 2011 tiuj servoj estis movitaj al la pli taŭga *Google Groups* (malkrom `pea_estrar`, kiun anstataŭas mesaĝtrafiko de/al `estrar@esperanto.pt`): La 20-an de majo la malnovaj grupoj en *Yahoo* estis “frostigitaj”, sen ebleco mesaĝi aŭ aniĝi, kaj al la ĝistiamaj membroj nur eblas eksciigi aŭ konsulti la mesaĝarkivon.

Reaboneblas per malplena mesaĝo al `pea_diskut+subscribe@googlegroups.com`, kaj plejparto el la jama anaro tuj reaniĝis. Jamaj anoj de la *Google*-servaro (inkl. uzantojn de la populara *Gmail*) povas aliri la novajn grupajn hejmpaĝojn en http://groups.google.com/group/pea_diskut (k.t.p.) kaj tie mastrumi siajn grupanejojn. Kompreneble tute ne necesas esti mem registrita ano de *Google* por uzi tiujn asociajn servojn. **AMT**

ARANĜOJ:

Lejrie Z-festo 2011



L. Zamenhof



A. Carvalho

Okazos la semajnfino 10-11-an de decembro nia ĉi-jara Zamenhoffesto, refoje neordinare eksterlisbone (pĝ.9, 10), en la centrportugalia urbo Lejrio (*Leiria*). Paralele kun la 152-a naskiĝdatreveno de la kreinto de nia lingvo kaj la kutima festado de ties literaturo, P.E.A. ĉefrolas en la memorigado de sia membro 0010 kaj grava lejriano, d-rino Alcinda CARVALHO. Pliajn informoj rete kaj en NB92. **AMT**

ASOCIO:

Telefonindo eĉ ŝparcela!

En marto 2011 la sideja telefonkontrakto ekhavis novan tarifon, kiu permesas, i.a. (pĝ.33), senpage voki al fiksjaj numeroj ie ajn en la lando. Telefona kontakto kun la asocianaro estas plu pli oportuna kaj lingve stimula, sed nun ankaŭ pli ŝpariga ol tiu letera. Tial ni petas ke ĉiu membro konfirmu/sciigu sian fikstelefonnumeron. **AMT**

MOVADO:

Nogeso ensorbita

La oportiana esperanto-klubo Nogeso (Norda Grupo de Esperanto-Studado; NB80:4) malaperis same neformale kiel ĝi ekis: Ja la landskala agado de ties anoj (cetere kelkaj ekloĝintaj eksterlande) delonge estas enkadrigita en la asocia laboro, kaj ties agado regiona/loka en la laboro de la asocia (nordokcidenta) loka sekcio PLUS. Tial ĉesas la kolo-fona mencio (pĝ.2), sen plia ŝanĝo.

Similaj kazoj pasintaj

Menciindas ke simile okazis ĉe pluraj lokaj grupoj: Brageso (Brago, 2002~2004), ALEK (Avejro, 1991~1996), ŬER (*Caldas da Rainha*, 1981~1986), "BfdIU" (Setublo, 1979~1981), k.c. La regularo pri lokaj sekcioj (uzata de PLUS), aprobita en 2002 (NB80:3), ebligas pli solidan enkadrigon de loka agado. **AMT**

MOVADO:

Oremo en loka agado

Jam en 1998 okazis en *Ourém* mezlerneja konferenco pri esperanto (NB72:9), plia loka unuopula agado de malnova asociano Carlos VIEIRA. Signifa progreso okazis en 2009, kiam tiu (bedaŭrinde liberigita de tempo-rabaj taskoj pro vidviĝo) gvidis unuan kurson de esperanto ĉe la loka kultura institucio *Academia Antero Nobre*. Sekvis elana lanĉo de t.n. *Associação Regional de Esperanto — Ourém*, la unuan de januaro 2010 (kio estis granda surprizo por la P.E.A.-estraro), kaj gratulinda sinsekvo de eldonitaj numeroj de ties bulteno. Kvankam P.E.A. ricevis nur unu el tiuj (kaj 4 el la bulteno de la menciita akademio inkl. esperantajn temojn), kaj estis petite ke letere, ne telefone aŭ retroŝte, oni kontaktu, estas granda scivolo pri la duma agado, tiom triumfisme kaj entuziasme tie prezentita. Estrarano vizitos. **AMT**

ARANĜOJ:

Dorna vojo al la 25-a R.P.E.

Okazos la duan semajnfinojn de oktobro (2011.10.08-09, kiu entenas la Ago-Tagon) nia "arĝenta" renkontiĝo, trafitaŭge en la norda limo de la Arĝenta Marbordo: plaĝ- kaj kazin-urbo *Espinho*. Ĝi rompas neatenditan trijaran halton (*) post la alkoŝeta okazigo (pĝ.8), kiu sesis en senpaŭza vico de post 2003. La loka organizskipo konsistas el kelkaj oport(i)aj kaj avejr(i)aj movadanoj, kiuj kuraĝis eklabori preskaŭ sen anticipo. Interesatoj aniĝu telefone aŭ ĉe <http://esperanto.pt/rpe025/>. **AMT**

(*) La penakova Zamenhoffesto en 2010 (pĝ.10) estis komence anoncita kiel 25-a R.P.E., sed la finfina eteco de tiu aranĝo decidigis ties "subrangigon". Malgraŭ ripetaj anoncoj, ne ankoraŭ okazos R.P.E. en *Estremoz* aŭ *Oleiros*, plu atendantaj optimuman situacion ĉe la fidindaj lokaj organizuntoj.

Programo (+libro-servo sabate p.t.m.):
sab. 12:00 Arĝo antaŭ la trajnstacio (ĉe *Solverde*, kruc. av. 8 kaj str. 19)
sab. 12:30 Komuna tagmanĝo en loka restoracio (unuopa pago por egala menuo: fiŝplado+deserto+kafo)
sab. 14:30 Prezento kaj malfermo.
sab. 15:00 Prelego de Emídio GARDÉ: *La Voŭga Linio ene de la Portugalia Mallarĝtraka Fervojreto*
sab. 16:15 Prelego de A. MARTINS-Tuválkin: *Kartludoj kaj ludkartoj*
sab. 17:30 Prelego de José M. MARTINS: *Klimatŝanĝiĝo kaj la norda portugalia marbordo.*
sab. 18:15 Sunfala plaĝpikniko (*/*)
sab. 21:30 *La escopeta nacional* (hispana humura filmo de 1977, kun ekrantraduko de Alexandra Paz)
dim. 09:30 Promeno al la dunaro kaj laguneto de *Esmoriz*, gvidata de Alcino ALVES, inkl. piknikon (*/*)
dim. 17:30 Adiaŭo antaŭ la trajnstacio.

MOVADO:

Pri la Renkontiĝoj de la Portugaliaj Esperantistoj

■ João José SANTOS

Jam tradiciaj, niaj renkontiĝoj pluiras malgraŭ la tempestoj, malgraŭ la malagemo, malgraŭ la organizmiso, malgraŭ la pigreco, malgraŭ la pesimismo.

Gratulon al la portugaliaj esperantistoj pro la fakto, ke tiuj renkontiĝoj pluvivas. La gastig-varmo de la esperantistoj de Figejro en 2007 (*NB90*:8-9) kaj de tiuj de Alkoŝeto en 2008 (pĝ.8), i.a. (1), reliefas, ke ĉefe kiam mankas la scienco, la amikeco kaj la verda entuzi-

asmo estas nemalhaveblaj elementoj por ke la movado pluiru. Tiuj psikaj kaj koraj elementoj estas nedubable la kerna konsisto de nia movado, nia plej granda forto kaj nia ĉefa celo.

Jen ĉi tie kelkaj ideoj, kiuj espereble plibonigos niajn renkontiĝojn.

Ĉu portugalaj aŭ portugaliaj?

La insisto ke ili estas portugaliaj, ne portugalaj, estas pro la fakto ke ili destiniĝas ne nur al portugalaj, sed al ĉiuj esperantistoj kiuj loĝas aŭ estas en Portugalio en tiu momento. Eta

(1) Teksto rivecita en 2008.10 sed daŭre aktuala. *red.*

5 ▶ nuanco, kiu povas ankoraŭ pli emfazi nian gastamon kaj kiu iom elcentrigas niajn renkontiĝojn el la etno portugala, por emfazi ke ili estas esperantiaj renkontiĝoj kiuj okazas en Portugalio. Fakte, ĉiuj ni deziras ke la ksenoj^(?) loĝantaj aŭ vizitantaj en Portugalio sin sentu, tiel komforte kaj plenaryte en tiuj renkontiĝoj, kiel la portugaloj, kaj do la aldono de tiu litereto "i" ĝustigas la esprimon al la reala penso de la portugaliaj esperantistoj.

La programo de la renkontiĝo

Tre klare ni devas scii kion ni esperas de niaj renkontiĝoj. Espereble, ili celas la jenon:

- 1a la kunfratiĝon de la esperantistoj kaj esperanto-amikoj, kun ĉiuj psikaj avantaĝoj por la esperanto-kunlaboro;
- 1b la amuzigon kaj kulturan riĉigon de la partoprenantoj, per la turismaj eroj de la programo, spektado de videoj kaj aliaj agoj ne tre fakaj;
- 1c la esperantistigon de la esperanto-amikoj, kiuj ankoraŭ ne parolas esperanton, per kursoj allogantaj ilin al la efektiva lernado de la lingvo;
- 1d la interŝanĝon de ideoj kaj vidpunktoj en esperanto, per fakaj konferencoj gravaj por montri ke la lingvo vivas kaj funkcias kaj sendube interesaj por la novaj kaj malnovaj esperantistoj, kies esperanto-kulturo riĉiĝos;
- 1e la disvastigon de esperanto inter la loka popolo, per disvastigaj agoj kiuj devas komenciĝi eĉ antaŭ la renkontiĝo kaj pludaŭri post ĝi;

1f la alvokon de ksenaj^(?) esperantistoj, kies ĉeesto en niaj renkontiĝoj montros, ke esperanto estas fakte internacia lingvo.

Krom la aldono de agoj ne kutimaj en niaj renkontiĝoj⁽³⁾, kiel ĵus priskribite, la programo de niaj renkontiĝoj nepre devas pliboniĝi en du aspektoj:

- 2a Ĝi devas esti konata almenaŭ unu monaton antaŭ la renkontiĝo. Ĝiaj eroj devas esti perfekte listigataj, tiel ke ĉiuj antaŭsciu kaj povu elekti sian ĉeeston en la diversaj eroj.
- 2b Tio estas eĉ pli grava, se la disvolvado de nia movado pravigos, dum la renkontiĝo, la ekziston de samtempaj eroj, ĉar kelkajn homojn ne interesas tro fakaj temoj, kaj tiuj povas profiti erojn celatajn al ili, dum la fakaj temoj estas pritraktataj de la homoj kiuj povas ilin profiti, ĉar ili regas esperanton.

Ĉu tre ambicie?... Ne, tute ne! Kelkaj rigardas la estinton, dirante: ni estas malmultaj homoj kaj la aliaj ne interesiĝas pri esperanto. Kvazaŭ tio estus destino, griza, nebula kaj aĉa destino, kiu malhonorus nin ĉiujn. Mi preferas pensi, diri kaj agi tiel: ni devas konstrui taŭgan strategion, por ke la estonto ne estu egala al la estinto.

Ĉu la 25-a Renkontiĝo de la Portugaliaj Esperantistoj, de 2009⁽⁴⁾, jam profitos kelkajn el ĉi tiuj ideoj? Eble jes, eble iu mem aplikos ilin.

La plibonigo de niaj renkontiĝoj interligiĝas kun la plibonigo de nia movado kaj, espereble, kondukos nin al la dezirata **Unua Kongreso de la Portugaliaj Esperantistoj**. ■

(?) Kseno = eksterlandano, alilandano (el la helena, kaj greka, "ξένος" = "fremda"); propono de la aŭtoro. *red.*

(3) Kelkaj eroj okazis en antaŭaj P.E.A.-eventoj. *red.*

(4) La 25-a R.P.E. finfine okazos en 2011 (pĝ.5). *red.*

ARANĜOJ:

Duoninsulaj IROj kun duonmanka ĉeo

IRo, Iberia Renkontiĝo: Tiu ĉi evento komenciĝis neoficiale en 2005, en *Mataró*, Katalunio (NB87:6-7), per la **Kapeguja Renkontiĝo**. Post la tiama internacia sukceso oni decidis ĝin okazigi marte/aprile ĉiujare en malsamaj lokoj de la Iberia Duoninsulo — finfine alterne organizota de KEJ, PEJ, kaj HEJS. Kaj tiel estis: La dua, **Atlantika Plonĝado**, okazis en *Areia Branca (Lourinhã)* (NB90:9) — poste en *Madrid, Benicàssim, Porto, Almagro*, kaj *Sant Andreu Salou (Cassà de la Selva, Girona)*.(*) Ties ĉefa logo estas kunigi la plurajn grupojn da iberiaj esperantistoj (kaj ofte ankaŭ alilandanojn) kaj tial ĝi estas bona loko por praktiki se oni estas lernanto. Atentu ke kvankam la eventon aranĝas junulaj grupoj, estas tre bonvenaj homoj ajnaĝaj. **NM+AMT**

La **Kampardoman Renkontiĝon**, en Madrido, 2007, ĉeestis ankaŭ pluraj portugaloj, sed ne tiom amase kiel en la antaŭaj fojoj. I.m.a. programeroj, premieris kromteksta traduko de la portugala animacia pupfilmo *La Suspekto*, fare de Alexandra PAZ.

La unuan “formalan” IRon kiun organizis KEJ, la **Internaciistan Renkontiĝon 2008**, markis multlingva reklamado celata ĉefe al komencantoj kaj interesatoj. Malgraŭe, ĉeesto de portugaloj ajn nivelaj mankis, eĉ se eksplicite alvokita de organizanto Ferriol MACIP. (Ne mankis tamen en la asocia retpoŝta forumo longa disputfadeno iniciatita de João SANTOS per atentigo ke «gravas ke oni klarigu al niaj katalu-



Paulo Branco

naj amikoj, ke fakte ne ekzistas iu ajn junulara esperanto-organizo en Portugalio»; sekvis i.a. konsilo el aktivilo de D(an)EJO ke «estas bona ideo ne paroli pri kio oni ne konas».)

Revenis en 2009 la vico al PEJ organizi IRon, la **Durian Plonĝadon** (↑): La unuan semajnfino de majo ariĝis en Oporto ĉ. 30 homoj el 6 landoj, inkl. 9 portugaliajn. Estis Libro-Servabudo, surrivera ŝipumado (sed ne plonĝado!), prelegoj pri kabeado (Lluís BATTLE) kaj pri vikipedio (MARTINS-TUVÁLKIN), la filmo *Blindeco* (filmo el la saramaga romano kaj kromtekste tradukita de Alexandra PAZ), kaj gustumado en gaja vinkelo. Loke organizis Roger PRIETO kaj Alexandra PAZ, kaj Nuno MAGALHÃES kreis apartan subretejon (<http://esperanto.pt/ir2009/>). Pro subita survoja malsaniĝo ne prelegis João SANTOS.

La **Vinlandan Kunvenon**, en 2010, la IRon okazantan ĝis nun pleje apud la landlimo (Almagro, en prov. *Cuidad Real*), neniu portugalo kuraĝis alveturi: Nure adopta madridano Bruno REIS povis iel “reprezenti” nian landon.

En 2011 ree portugalianoj ne vojaĝis al plia aliŝtata IRo (**Internaciista Renkontiĝo**): Ĉu do la aliaj iberianoj venĝe bojkotu en 2012 (pĝ.3)?... **AMT**

(*) Ĉiu okazigo havas apartan nomon: http://eo.wikipedia.org/wiki/Iberia_Renkontiĝo.



Vendstablo koridore

Alkoŝetanoj ĉiu-aĝaj
prezentas la du loke
gravajn verdajn
movadojn...

Prelego de João SANTOS

Prelego de
Gonçalo
NEVESFadumas José MARTINS
kaj Simplicio MOURA (↑)

ARANĜOJ:

24-a R.P.E., 2-a Alkoŝete

Dum la semajnfino de la 4-a kaj 5-a de oktobro, 2008, P.E.A. okazigis la **24-an Renkontiĝon de Portugaliaj Esperantistoj**, lokorganizita de Miguel BOEIRO kaj aliaj anoj de la Amikeca Grupo de Alkoŝeto (*Alcochete*) — tiu apudlisbona riverborda urbeto, jam en 1999 gastiginta R.P.E.-n. La sidaj programeroj pasis en la prestiĝa urbo-doma salono, kaj en apuda koridoro funkciis paralele libro-venda stablo (↗), kun rimarkinda sukceso. En la suba halo publike viziteble pendadis jam semajnon la asociaj ekspozicipaneloj (kaj tie restis plu jaron). Trafa antaŭtempa diskonigo de la evento kaŭzis nemalbonan artikolon en la loka gazeto (★G0513: *Jornal de Alcochete* 2008.10.04: 3).

Sabate, post agrabla kaj abunda bufeda tagmanĝo en la “popoldomo”, invite de la lokanoj, ĉiuj promenis al la apuda urbo-domo kie la kulturskabeno eldiris nekutime kleran kaj afablan akcepton. Sekve, la lokanoj (plejparte komencantoj!) surscenigis verve varian teatrekan prezenton pri sia urbeto kaj regiono, en kuraĝa esperanto (↘). Poste la du plej brilaj okazoj de la Renkontiĝo: Unue prelegis João SANTOS (←) pri “Ĉu oni tradukas la proprajn nomojn? — Esperantaj nomoj elvenantaj el la portugala lingvo”, kun bunta surmurekrana panelaro (*LK11:19-23*; rete havebla); sekve Gonçalo NEVES (↔) kiu prezentis kaj pridiskutis la novverkon *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. Post ĉiu prelego sekvis poe mallonga sed vigla kolokvo. La programan vespermanĝon en la fama restoracio *Aposento do Barrete Verde*, kun fada akompano, maltrafis pluraj, ĉefe lisbonanoj kiuj ne tranoktis gaste.

Dimanĉe matene, la ĉ. 35 renkontiĝanoj vizitadis la historian centron de la urbeto, ties muzeon, kaj la lokajn salsekejojn. Oni kune tagmanĝis en la fama *Casa da Malta*, kie ree sonis fadoj — ankaŭ kun voĉoj kaj gitarludo sonorigitaj de la P.E.A.-grupo (↔). La posttagmezon plenigis mallonga kunveno de la asocia Ĝenerala Asembleo (pĝ.20), kaj la Renkontiĝo finiĝis per adiaŭo kaj disiro antaŭ belega supertaĝa sunfalo en la pejzaĝo de Alkoŝeto. AMT+WB

ARANĜOJ:

1859-2009: Jubilea Z-festo en Lisbono

La 150-jariĝon de Zamenhof, kreinto de esperanto, malmultaj forgesis — ĝi ja eĉ aperis en la komencpaĝo de la anglingva (!) Vikipedio (http://web.archive.org/web/20091215202936/http://en.wikipedia.org/wiki/Main_Page), kiel la 15-an mem raportis estrar-prezidanto José MARTINS, jam post la anoncita festado organizata de P.E.A. en Lisbono, la antaŭan semajnfino, la 12-an kaj 13-an de decembro. Tio estis decidita ankoraŭ septembre, kompenso de manko de R.P.E. en 2009 (pĝ. 5) kaj de la antaŭjara fiasko (ĉiĝo).

La programo ambicie inkluzivis erojn kiuj finfine ne plenumiĝis: unu prelego kaj du libro-lanĉoj (pĝ.30,32), ĉio kulpe de estrarano A. MARTINS-Tuvalĉin. Savis la eventon ja la plenumo de aliaj planitaj eroj: Sabata pre-




zento de la nova lernlibro *O Esperanto em 30 horas* (★02.058: 25,00 €; pĝ.26) kaj dimanĉa vizito al la lisbona Sciencmuzea Botanika Ĝardeno, laŭkutime gvidata de fakulo Alcino ALVES (pĝ. 20), kiu ĝin bonege konas, per preciza lingvaĵo kaj informriĉa interpreto.

La tutan eventon organizis estrarano Wilson BRÍGIDO, kiu i.a. kunmetis dokumentaron disdonitan al la ĉestantoj (jen ripetinda nekutimaĵo!). Tiu enhavis la programon, krucvortojn k.s. enigmojn, memorigan bildkarton (← nun en Libro-Servo ★00.133 je 0,25 €), kaj kelkajn legaĵojn — inkl. la zamenhofan paroladon en la U.K. 1910, ŝercojn, kaj poemojn.

La salona programo, sabate, okazis en la memserva manĝejo de *Sociedade Portuguesa de Naturalogia*, jam en 2005 gastiginta Z-feston (NB89:9), danke al la apogo kaj kunlaboro de naturistaj esperantistoj Miguel kaj M.^a BOEIRO. Tie oni ĝuis nepre naturisman tagmanĝon, per kio komenciĝis la sesio. (↑)

Post la libro-prezento oni spektis grandekrane la portugallingvan dokumentan filmon de brazilano Djalma PESSATA *Zamenhof — Um cidadão do Mundo*, eldonitan de La Karavelo (★00.099: 15,00 €). **AMT+WB**

WB



ARANĜOJ:

2008 sen Z-festo...

Meze de 2008 la tiujara Zamenhof-festo estis anoncata por du sudlisboniaj urboj: Alkoŝeto kaj Barejro, kun i.a. vizito al la esperanto-monumento sur placeto Zamenhof en ĉi lasta urbo, prezentiĝo de lokaj komencantoj, kaj prelegoj de Gonçalo NEVES kaj João SANTOS. Organiza miskompreno malbligis tamen la eventon. **WB+M^aB**



ARANĜOJ:

Zamenhoffesto 2010 senpene kovita

Grupo restoracie, antaŭ la Mondego transfenestra...

La postjubilea Zamenhoffesto estis alvokita de la estraro por la semajnfino 11-12 nur novembre, per telefono kaj retpoŝto. Hejmeca (ne)programo kaj etpreza tranoktebleco (7,50 €) allogis.

La domo de Penakovo (*Penacova*), plu apartenanta al la iel esperantista Kooperativo "Saluton!" (pĝ.2), multe plibonigita en lastaj jaroj, gastigis nur 12 veturemulojn (ĝia plenplena kapacito estas 20 homoj, 13 en pleja komforto), post kiam plurajn timigis la severvetera prognozo de la antaŭa semajno, bonŝance ne praviĝinta. Tiuj estis Alcino ALVES (kun neesperantista kunulino Aurora), Antónia CARVALHO, António MARTINS-Tuválkin, Iuri GASPAP, José MARTINS, Luís OLIVEIRA, Manuel José PINGUINHA, Marta MARTINS, Nuno FIGUEIREDO, Nuno MAGALHÃES, kaj Simplicio MOURA.

La ĉarman ĉemondegan urbeton alveturis oni en pluraj grupoj kiuj kunigis por komuna tagmanĝo. Dum la rapide noktiĝanta posttagmezo, la grupo plene ariĝis en la domo mem, kie estis asigno de dormĉambroj, tramontado al unua-fojanoj, kaj prezentiĝo inter nekonatoj. Malgranda stoko el la asocia Libro-Servo estis en konstanta ekspozicio, el kiu oni aĉetis, kaj ĵuse ordigita kantaro el partituroj kaj kanttekstoj trovitaj dise en la sidejo estis al la kantemuloj disponigita.

La vespero pasis en malstreĉa etoso, kun kelkaj opetoj babilantaj tra la domo kaj korto, kaj vigla kantemularo en la kuirejo, el kie sonis, kun gitara akompano, pli malpli voĉharmonie esperantlingvaj baladoj, fadoj, marŝoj — kaj eĉ konataj kantoj kun nekutimaj tekstoj: maldecetaj kaj movadsatiraj! Post vespermanĝo iom post iom la etoso trankviliĝis kaj kelkaj eltenis ĝis post la dua matene, trankvile babilante pri lingvaj kaj movadaj temoj.

Dimanĉe matene la grupo sukcesis pretiĝi, malgraŭ malvarmeta nokto kaj spartecaj duŝiloj, kaj akurate je la deka preskaŭ ĉiuj eliris en la maldensiĝantan nebulon por tre interesa promenado sepkilometra ĉirkaŭ la apuda klifo *Penedo do Castro*, kun laŭkutime klera kaj vigla ĉiĉeronado fare de Alcino ĉefe pri la botanika aspekto de la trapromenataj lokoj. Abundego de diverstipaj plagplantoj (akacioj, eŭkaliptoj, hakeoj, pampherboj) difeskis la ĝueblon de la pejzaĝo sed estigis interesan babilon pri la temo.

Sekvis agrabla kunmanĝo en loka restoracio (↑) kun belega panoramo super la meandranta Mondego, viglita de tostoj je la datrevenanta Zamenhof kaj al ties kreaĵo. Posttagmeze la grupanoj revenis al la domo por ordigado kaj disiro, jam kun emo al iama, baldaŭa reveno. *AMT*

INFORMADO:

Ĉe la vizelaj Rotarianoj

La *Rotary Clube de Vizela* okazigis en 2010.01.15 prelegon sub la temo «*Como otimizar a ordem linguística mundial? Imperialismo linguístico e sobrevivência linguística. O problema da língua universal neutra. Línguas étnicas e línguas planeadas. Prognose sobre a língua portuguesa no Mundo*»; sekvis esperanto-provleciono kaj debato. La eventon, okazintan en loka mezlernejo, gvidis la konata esperantisto Faria de Bastos, mem denaske vizelano, kune kun nova loka esperantisto Belmiro Martins, kaj ĝin ĉeestis ĉ. 100 homoj. Ĝi estis la sekva movada evento en Vizelo (*Vizela*) post la 16-a R.P.E., en 1996 (NB70:6-8). **AMT**

INFORMADO:

Ĉe la figarbaj Kiŭanianoj

Januaron 2009, ĉe la *Kiwanis Clube da Figueira da Foz*, prelegis pri esperanto loka esperantisto kaj P.E.A.-gvidanto Antónia Carvalho, antaŭ 35-homa publiko. La eventon kunhelpis komencantoj Lídia, Gená kaj Nuno Rafael, kaj estis agrabla okazo respondi oftajn demandojn pri nia lingvo. Krom ĝeneralaj detaloj pri la historio kaj aplikado de esperanto, oni demandis ĉefe pri ĝia uzo en la reto. **AC+AMT**

INFORMADO:

Maloftaj lingvoj

En 2011.01.13 la estrarprezidanto, José Martins, estis intervjuata dum unu horo en programo “*Fórum Contrastes*” de *RegiõesTV*. La rezulta 50-minuta peco elsendiĝis la 8-an de februaro je la 22-a horo, kadre de rubriko «Malpli parolataj lingvoj», dividita inter esperanto kaj la miranda lingvo (asturleona dialektaro de nordorienta Portugalio, tutlande kunoficiala); *RegiõesTV* spekteblas en la kanalo 88 de *Zon/TV-Cabo* kaj 14 de *CaboVisão*. **AMT+JMM**

INFORMADO:

Eon pidome

Okazis marte de 2006 (NB89:11) “Lingva Semajno” en la lisbona karitata lernejo *Colégio de Nossa Senhora da Conceição* (de *Casa Pia*). Unu el la lernantskipoj estis elektinta la temon esperanto, petinta helpon de P.E.A. por sia ekspozicio kaj venigis estraranon A. Martins-Tuválkin por prelego. Tiu priumis lingvan diversecon, planlingvojn kaj, ĉefe, esperanton antaŭ ĉ. 50 lernantoj 9-13-jaraj kaj deko da instruistoj. Malgraŭ la mallalta kultura kaj socia nivelo de la infanoj, ilia interesiĝo kaj atento estis notinde intensaj (kaj pli grandaj ol tiuj de la instruistoj). **AMT**

INFORMADO:

Kafejbabilo T.V.-e

Elsendiĝis en 2008.03.27 intervjuo pri esperanto en la programo “*Luz Verde*”, produktita de *Take5* por la kablakano AXN. Respondis demandojn José Martins dum fone babilis specimene Roger Prieto, M.^a Boia Martins, Alexandra Paz, kaj Nuno Magalhães. El la 30-minuta interparolo, en oportuna ĉemara kafejo, fariĝis 1½-minuta peco (09:25-10:47), havebla en <http://esperanto.pt/dok/axn08.mpg>: Jen laŭkutime mezbona ĵurnalisma laboro. **AMT+JMM+NM**

INFORMADO:

Barejro interesigas

Kadre de la esperanto-kurso en *UTIB*, en Barejro (*Barreiro*) (pĝ.25), okazis la 4-an de oktobro 2010 prelego kaj lokvo gvidata de konata esperantisto João José SANTOS. Ĝin ĉeestis 56 homoj: kursanoj kaj instruistoj ankaŭ de aliaj fakoj, loka publiko veninta pro trafa publika diskonigo (i.a. la fama aktoriĝo Io APOLLONI, kiu vigle elpaŝis debato), kaj gaste esperantistoj M. BOIEIRO el Alkoŝeto kaj Vaz PINTO el Oportio. (Pli en *LK22*:18-19 kaj <http://maisutib.blogspot.com/2010/10/esperanto-na-utib.html>.) **AMT+JJS**

HISTORIO:

Barejro memoras

Kadre de la festado de la 25-a de aprilo 2011, la urbestro de Barejro (*Barreiro*) okazigis serion da babilsesioj pri la loka historio dum 1926-1974, el kiu unu temis pri esperanto. Temis pri pozitiva evento, malgraŭ misa vortumado en la koncerna afiŝo (►) — kiu enhavas la konfuzigan vorton "*esperantismo*"(*) kaj prezentas kvazaŭ historiiston la relative junan P.E.A.-estraranon António MARTINS, kontraste al la loka malnova esperantisto invitita, tromodeste titolita metilernanto («*aprendiz*»). Ĉeestis la interesan diskuton pluraj pluvivantoj de la mita esperantista epoko (*NB75*: 4-5 i.a.), kiel Artur OLIVEIRA, Luís DUARTE, kaj Leal da SILVA, lokaj ĵurnalistoj, du skabenoj, kaj ĉ. deko da nuntempaj novuloj (pĝ.25) — sed bedaŭrinde neniom da ĝenerala publiko. **AMT**

(*) Revortumita sen ĝi («*O Esperanto e Esperantistas no Estado Novo*») en la oficiala retejo: <http://www.cm-barreiro.pt/pt/contenudos/noticias/+e+eventos/noticias/destaques/tertuilias.htm>.

ARANĜOJ:

Ĵaŭda apudsideja vesperkafumado

Dum la vintro 2010-2011 okazis, post retroŝtaj alvokoj, neformalaj hazardecaj renkontiĝoj de kelkaj lisbonaj esperantistoj en kafejoj apud la sidejo. Plej memorindas tiu de la 16-a de decembro, kiu pluis en la apuda muziklernejo (*Escola Superior de Música de Lisboa*) por (senpaga) spektado de ĵazkoncerto kie pianludis "nia" Iuri GASPAR. Ĝi laste okazis la 2-an februaro, sed oni emas plui: Interesatoj kontaktu. **AMT**

25Abril2011
BARREIRO



No âmbito das Comemorações do 25 de Abril, a Câmara Municipal do Barreiro tem o prazer de o/a convidar para a *Tertúlia Esperanto e Esperantismo no Estado Novo* com a presença de António Martins da Associação Portuguesa de Esperanto e de José Miguel Leal da Silva aprendiz de Esperanto, *lernanto*, no dia **21 de Maio de 2011**, pelas **16h00** na **Galeria Municipal de Arte** (Antigo Tribunal).

Morada:
Av. Alfredo da Silva nº 15

Abril, somos nós!





La ĵusan 96-an Universalan Kongreson en Kopenhago, krom lokano Rute Di PONTI kaj bruselano Paulo BRANCO, ĉeestis portugaloj M. Faria de BASTOS kaj edzino, Belmiro MARTINS, geedzoj M. kaj M.^a BOIEIRO kaj LUÍS LADEIRA. Ĉar dum la inaŭguro la P.E.A.-komitato M.F.B. vortsalutis la Kongreson nome de AngEA, kies Asemblea Stabestro li estas, kaj kiel sola kongresano el Angolo, nian asocion finfine tamen neniu reprezentis per saluto pro neeblo trovi elpaŝemulon. P.E.A. nepre evitos la samon estontece, kaj petas al ĉiuj asocioj kiuj planas ĉeesti en Hanojo kaj en Rejkjaviko b.v. kontakti por kunordigo, tiel ke nia lando ne manku antaŭ la tutmonda movado. **AMT+MFB**

APLIKADO:

Karikaturaĵojn senvuale

En 2008.06.23, okaze de la 10-a *PortoCartoon* (mondfestivalo pri bildsatiro), Oporto estis proklamita la **Monda Ĉefurbo de Karikatur**, kun urbes-trara apogo, laŭ iniciato de *Museu Nacional da Imprensa* (Landa Presmuzeo). I.a., la proklamon legis dum monumentinaŭguro supre de la Ali-

ancanavenuo, ĉiu el la 10 ĉeestantaj eksterlandaj humurdesegnistoj, en alia **lingvo** — sed por ŝercefiko, ne nepre en la sia! Legis esperantlingve (neesperantisto) brazila-**no Edu GROSSO** (http://www.cartoonvirtualmuseum.org/i_noticias.htm?u=4#porto%20capital%20do%20cartoon). Tiu ĉi estis plia elpaŝo pri esperanto en la

INFORMADO:

Varbile arganile

La 26-an de marto 2009 okazis en mezlernejo de *Arganil* unuhora klarigprelego pri esperanto, antaŭ grupo da geknaboj kaj tri instruistinoj kiuj plenis klasĉambron. Ĝin gvidis entuziasma esperantisto Manuel PINGUINHA (**NB84:5**) kunlabore kun instruistino Maria de OLIVEIRA, kiu mem tiam eklernadis la lingvon. **MJP+AMT**

INFORMADO:

“Espero Katolika”

Fine de 2006, João SANTOS hazarde eksciis ke komputila servo de la Portugalia Katolika Universitato uzas internan protokolon por mastrumo de petoj nomatan *Esperanto*. Sekve de neformala gratulo pri tio, li invitive kontribuis portugallingvan tekston pri esperanto, kiu estis baldaŭ enretigita kaj daŭre legeblas, 4¾ jarojn poste: <http://www.ucp.pt/site/custom/template/ucptplminisite.asp?sspagelD=3725&lang=1>. **AMT+JJS**

satirbilda medio entreprenita de (lisboniano) LUÍS LADEIRA (al kiu ne plaĉis la fonetika rezulto de la de li trejnita “papa-gumado”), ankaŭ responsa pri la tradukado en esperanton de ties faka retejo (**NB89:10**), laboro kiu daŭris ĝis 2010 kaj kiu fiksas ankaŭ en esperanto i.m.a. la reason de la tutmonda bildsaturitaro al la t.n. mohamedkarikatura krizo. **AMT**

INFORMADO:

Loka agado en Alenteĝo*

Dum sia plentempa loĝado en Estremozo (*Estremoz*), en 2007-2009, konata esperantisto João José SANTOS ankaŭ loke informadis pri nia lingvo — krom prizorgo de la eldonprojekto *La Karavelo* (pĝ.27), kiu estis ja loke apogata sed skale tutmonda. «Ekzistas ununura lingvo-lernejo, en ĉi urbo dekmilhoma», kaj tiu mem «baldaŭ fermos porĉiame la pordojn.»(...)«La afabla geparo kiu posedas la etan instituton (ŝi portugalingo, li anglo)»(...)«tute elreviĝis pri Estremozo, kies etoso, laŭ ili kaj multaj aliaj, estas socie tre tre fermita.» Tiufone, la disvastigaj agadoj entreprenitaj de João SANTOS takseblas sukcesoj.

Jam en aprilo 2008 okazis prezento de esperanto kaj de *La Karavelo* en la kafejo *AtéJazz* (LK7:3-5), kiun ĉeestis, inter ĉ. 50 homoj, kvin esperantistoj (el kiuj unu loka, alia flandra). Tiu sama kafejo gastigis pliajn similajn eventojn: Maje 2009 (LK15:3-5), al ĉ. 30 ĉeestantoj, João SANTOS prelegis pri «Esperanto kaj Lingvaj Rajtoj», kunlabore kun la loka filio de Amnestio Internacia, kaj novembro samjare, lanĉo de nova lernlibro (pĝ.26) antaŭ 50-homa publiko.

Novembron de 2008 okazis duobla prelegsesio en la loka mezlernejo (LK12:23), kun i.a. filmetoj pri esperanto; ĉeestis entute 55 lernantoj 12-ĝis-18-jaraĝaj kaj kvin instruistoj: «Estas interese scii, ke la disvastiga agado pri esperanto disvolviĝis far la departemento pri angla kaj kastilia lingvoj.» En marto 2009, «La Karavelo — Esperanto» estis unu inter ĉ. 100 budoj en la tritaga Foiro de la Lernejoj (LK14:24, LK15:22-24), kun plurcent vizitantoj.

Finfine, en novembro 2009, João SANTOS prelegis en la evora *Intensidez*, 50 km fora. Tiu libro-vendejo, intertempe fermiĝinta, vendis sep ekzemplerojn de *Esperanto em 30 horas*. **AMT+JJS**

(*) Portugallingve "Alentejo" [alẽ'teʒu], el "alẽm Tejo", t.e. "trans la (rivero) Taĵo" (NB56:17-19, NB57:9-12,16-17) — temas pri regiono historia ("komarko") kaj moderna (C.C.(D.)R.-areo kaj NUT53-unuo) en la sudo de Portugalio, kiun sude limigas la algarva montĉeno, norde la Taĵ-vala kaj-estuara malaltejo, kaj nordokcidente la setublia krutejo. La esperantigo "Alenteĝo" laŭas la uzon kaj (publikigitan) sistemon de João SANTOS (pĝ.8); aliaj uzas malsaman fonologian asimilon, "j" al "ĵ" ("Alenteĵo"); kromaj preferas kunmetaĵojn el jamaj radikoj ("Trans'taĵ-ejo", "-io", "-lando").

INFORMADO:

Alternative

Publikiĝis en 2009.04.11 intervjuo pri esperanto al estrarano Nuno MAGALHÃES, en temnumero (pri anoj de "alternativaj" movadoj en Oporto) de la ISMAI-studentjurnalo *Ágora* 7: pĝ.9 (<http://www.ismai.pt/MDE/Internet/PT/Superior/Escolas/ISMAI/EliminadosExpirados/agora7/P%C3%A1gina+79.htm>). Ĝi plenigas tutan nigrfonan paĝon kies duonon kovras vizaĝfoto — kvankam nur ĉ. 2/3 de la farita intervjuo aperas, per eta blanka tiparo, kun kelkaj (tipografiaj) eraretoj. Ĝenerale ne terure malbone, sed certe povintus pli boni. **NM**

INFORMADO:

Analfabete

Post kiam la municestraro de *Lagoa-Algarve* ricevis laŭpete helpon de P.E.A. por sia 2005-a ekspozicio pri mondaj skribistemoj, nia entuziasmo rapide ŝrumpis: Ne nur nia lingvo prezentiĝis kiel alfabeto (samrange kun brajlo kaj morso: NB89:12), sed ankaŭ aliajn temojn oni mize-re traktis: I.a. vidiĝis devanagara teksto turnita kapmalsupren! **AMT**

KULTURO:

Rokbando iksumas pri NIFOj

Qwentin, eksperimenta rokbando el *Cartaxo*, vicigas en ĉiuj tri eroj de sia verkaro zonon kiu titoliĝas “NFO Kronikoj”, kaj tekstas jene:

vi ne kredu. gxi estas cxiom mensogo, imaga rezulto.

vi ne kredu. gxi estas cxiom imago, propaganda rezulto.

vi ne kredu. gxi estas cxiom propagando, tima rezulto.

vi ne kredu. gxi estas cxiom timo, malklarigebla rezulto.

vi ne kredu. gxi estas cxiom malklarigebla, vera rezulto.

vi ne kredu. gxi estas cxiom vero.

Sciigo ĉi-prie en 2008 vekis pasian reagon en la asocia diskutforumo, ĉefe flanke de João SANTOS — ne tiom pro la konspiriteoria temaliro, muzika stilo, poezia kvalito, aŭ eĉ lingva nivelo, sed pro la ortografia elekto. Malgraŭ iuj interesaj flankdiskuteroj kiuj sekvis (i.a. ĉu iksojn pro intenco aŭ pro miskompreno; komparo de Dolcxamar’, poste Dolchamar’, kun la neesperantaj Mo-

törhead kaj Blue Öyster Cult), mankis pli vasta intereso ĉi-prie.

La kanto, stile rapidmetala, temas pri niĝoj; titolon laŭdire el «nekonata *fluigi objekto». Ties unua publikiĝo okazis en 2004 (unu el tri zonoj de la albumeto *Il Commence Ici*), dua la en 2005 (el kvin de *Uomo-Tutto*), kaj la tria en albumo *Première!* en 2007, kun 13 zonoj, el kiuj ok estas kantataj en sep lingvoj. Post sukcesa turneo en 2008, kronita de antaŭprezento en la lisbona koncerto de la usonanoj *30 Seconds to Mars*, la spuro de Qwentin perdiĝas.

Notindas ke la esperantteksta zono estas (je julio 2011) la dua plej populara en retejo de tiu ĉi bando (<http://www.myspace.com/qwentin/music/songs/nfo-kronikoj-25531472>), el inter la seso havebla (unuavicas angllingva kanto, postrestas laŭorde nederland-, ital-, hispan- kaj franc-lingve kantataj zonoj). Efektive, Qwentin uzas i.a. multlingvecon en la etosigo de siaj surscenigoj (laŭ <http://pt.wikipedia.org/wiki/Qwentin>), kvankam la misa titol-etimo kaj -siglo kaj iuj prononco-raroj (ĉefe *«rredzulto») supozigas ke neniu el la kvin skipanoj vere regas esperanton. Aĉeteblis iam T-ĉemizo kun ero el la teksto: http://i15.photobucket.com/albums/a355/qwentin/final_banner_shirt.jpg **AMT**

KULTURO:

Lingvo ankaŭ de senŝuaj piratinoj

«Mia espero ne pereos. Jes, ne eblas ŝanĝi la komencon sed, se ni volas, eblos ŝanĝi la finon.» (*) Tiel tekstas (kaj



sonis!) la himno de la Egalecpiratinoj — infanaktiviga mediprojekt- & homrajt-tema projekto realigita de la acora teatristaro *Descalças* — *Cooperativa Cultural*.

Okazis ses sesioj en pluraj lokoj de Mikaelinsulo dum 2007.07, kiujn ĉeestis entute ĉ. 300 infanoj. Tradukis laŭpete estrarano A. MARTINS-Tuválkin. **AMT**

(*) Ĉe <http://vimeo.com/26155723> (03:12) kaj <http://descalças.blogspot.com/2007/07/as-piratas-da-igualdade-fotos.html>. Kvankam ĝustaj en kromteksto, ĉapeloj kriplas logotipe pro fuŝa tiparo.

HOMOJ:

Olga ALMEIDA 1923-2010

Olga Serra Marques de ALMEIDA esperantistiĝis en 1950, en la sama rondo kiel ŝia baldaŭna edzo António S. ALMEIDA (kafejoj *Chave d'Ouro*, poste *Martinho*, Lisbono). Olga estis unu el la fondintoj de nia asocio en 1972 kaj ties unua estrarsekretario (ano n-ro 0006). En tiu posteno (akumulita kun i.a. la Libro-Servo kaj eventorganizado), Olga intense movadestriĝis 1984, kiam ŝi ekpostenis en la Kontrolkomitato: revizoro (ĝis 1990) kaj prezidanto (ĝis 1992). Ŝi dume kaj poste ankaŭ

prizorgis la albumon de gazetaj eltondaĵoj, kaj tiun de movadaj fotoj. En 1976, Olga traktis kun U.E.A. pri la aniĝo de nia asocio. Ŝi estis ankaŭ la Direktoro de *Nia Bulteno*, dum tiu posteno estis deviga (1975-1999), kaj ŝi estis unu el la parolistoj kaj redaktoroj de la esperantaj elsendoj de *RDP Internacional* (en 1976-1980). En 1983, ŝi kunakolitis la unuan esperantlingvan katolikan meson okazintan en Portugalio (NB83:10). Olga ankaŭ longe aktivis en Kooperativo "*Saluton!*", dum ties plej esperanta fazo (1984-2005).

Ŝi estis krome landa peranto de *Esperantista Vegetarano*.

Kun sia edzo ŝi ofte ĉeestis esperantajn — aranĝojn (grezijone, ĉ. kvin 5 HEK-ojn, ĉ. sep U.K.-ojn, kaj ĉi-



HEF



ASA

ujn landajn eventojn ĝis 2004; plurajn poste).

Olga havis tre klarajn opiniojn pri la movado, kaj ŝi malofte hezitis ilin sciigi; ŝi estis amata kaj ege respektata — de ĉiuj portugalaj esperantistoj. Sian tutan vivon ŝi apenaŭ parolis nacilingve en movada medio kaj estis konsiderata de Saldanha CARREIRA la plej bona portugalaj esperantistino.

Ŝi forpasis tute subite la 16-an de junio 2010, en Galegio, hotelĉambre inter la brakoj de sia edzo.

Korŝirite, ŝia Portugala Esperanto-Asocio funebrias kaj kondolencas.

ASA+AMT

JANKOWSKI





Sideje, ĉ. 1988 (↘); salutante la 39-an HEK-on, 1979 (↑); en Kampustelo, 2009 (↗); en Sabadell, 1977 (kovr.).

HOMOJ:

Virgílio Campos PORTELA (1921-2005; *Cacilhas* ALM; ★0021), veterana esperantisto, aŭtoris ne malpli ol 48 gazetartikolojn pri esperanto (*República kaj Jornal de Almada*), inkl. kurson, en 1969-1974. I.m.a, notindas kiel la esperantistiginto de alia senlaca disvastiganto de nia lingvo, Manuel PINGUINHA (ĉipĝ.).

Apotekisto João Afonso **Saraiva CANEJO** (1913~2003; ★0902↘), vigla, tipeca lisbonano; i.a. klopodis pri disvastigo en sia naskurbeto *Coruche* (NB66:12).



Ernâni **Ladeira MARTINS** (1910-2000; *Oliveira de Azeméis*; ★0085↘), ŝuuzinestro aktiva ĝis post sepdekjariĝo; rimarkinde ligita al la tutmonda movado, lingve kaj organize, kvankam izolita esperantisto en sia loĝurbo. **AMT**

HOMOJ:

Hered' post 25 jaroj

António Manuel Freire **Estanco LOURO** esperantistiĝis junulaĝe kaj P.E.A.-aniĝis tuj en 1972 (★0310), tiam jam I.M. de U.E.A. Anarkiisto, li rilatis i.a. kun Alberto Pedro da SILVA; kiel poŝtmarkemulo kun samhobianoj tutmonde. Forpasis akcidente 57-jara en 1981; liajn esperanttemajn havaĵojn lia familio konservis ĝis 2006, kiam P.E.A. ricevis la interesan dokumentaron. **AMT**

MOVADO:

Kredante tamen ke landasocio ne devus opinii pri I.M.-aferoj, la estraro de P.E.A. finfine rekomendis al U.E.A. en 2011 **ĉefdelegitecon** al la jama Manuel PINGUINHA, antaŭ du aliaj ebloj. **AMT**

HOMOJ:

Seabra-Dinis: forpason malfrue



P.E.A. ne facilanime forpelas esperanto-parolantajn asociojn, nur kaze de mem indikita ekziĝo aŭ konfirmata forpaso — alie, manke de kontakto, la membreco oficiale pluas (kaj akumuliĝas pagenda kotizaro). Foje pri forpasintoj ni ekscias nur tre malfrue — rekorde tiel pri Joaquim Seabra-DINIS (↗), 1914-1996, grava psikiatro, neŭrologo, kaj psikologo portugala, kiu aktive anis en nia asocio en 1984-1987 (★0843; i.a. vd. ★G0051).

Kune kun la ekscio de lia forpaso, en aŭgusto 2011 (*), ni informiĝis pri tio ke lian privatan dokumentaron akceptis la koimbruniversitata Interfaka Studcentro pri la 20-a Jarcento (*CESI20*) kaj ke ĝi nun publike disponeblas kiel Biblioteko Seabra-Dinis (✉). Planatas surloka esploro pri kiom/ĉu da esperantaĵoj tie troviĝas. **AMT**

(*) La oficiala eksigdato estas 1996, kun retroa indiko ke li tamen enlistis ĝis 2011.08.03, por komprenigi antaŭajn statistikaĵojn sed ebligi novajn pli precizajn.

(✉) *Biblioteca Joaquim Seabra-Dinis, Centro de Estudos Interdisciplinares do Século XX da Universidade de Coimbra*, ☒ Rua Filipe Simões, 33; PT-3000-186 COIMBRA <http://www.ceis20.uc.pt/ceis20/site/index.php?target=showContent&id=79>

ASOCIO:

En la Biblioteko, per renovigilo...

La libra biblioteko de nia asocio okupas nun plurajn bretmetrojn en la sideja salono, kaj ĝi kreskadas depost 1972 per donacoj de asocioj kaj de eldonejoj — ĉ. 3000 volumoj enestas.

Antaŭ ol la nuna Wilson BRÍGIDO (pĝ.30), prizorgantis laŭvice A. da SILVA ALMEIDA, Gonçalves PIRES, Gonçalves NEVES, kaj Werther SACRAMENTO. La bedaŭrata forpaso de ĉi lasta en 2005 necesigis la jenajn estrarajn iniciatojn:

1. plena enkomputiligo de ĉiuj paperaj registroj cele al anstataŭigo — kio finiĝis en mezo de 2008; kaj
2. funkciigo de tute nova aliro al bretdigado, al konsultaj kaj pruntaj reĝimo kaj proceduroj, kaj al bibliotekmastrumo ĝenerale — kio ekis en 2008 kaj daŭras plu.

Enkomputiligo konsistis el entajpado (en la kalkulfolian programon *MS Ex-*

cel) de la laŭnumera registrlibro kaj de la kartonaj slipetoj. El la libro tajpis A. MARTINS-Tuválkin, Alexandra PAZ kaj Nuno MAGALHÃES, kaj el la slipoj tajpis António TAVARES, Antónia CARVALHO, kaj Rui PALMA (*NB89:6*); ambaŭ taskoj ekis ankoraŭ dum vivis Werther (kiun tiutempe cetere helpis Pedrosa ALVES), fariĝis poiome kaj finiĝis komence de 2006.

Poste farendis la kunigo de tiuj du listoj: Ĝi reliefigis tamen kelkajn malnovajn erarojn (kiajn nur per komputilo oni povas efike trovi), kaj ties korektadon A. MARTINS-Tuválkin faradis ĝis marto 2008. Rezulte, en unu listo laŭ komputile uzebla formo ni fine ekhavis ĉiujn informojn pri ĉiuj libroj.

La tuta libraro estas nun reordigata laŭ nova aranĝo, kiu kunigas, sur la saman aŭ apudajn bretojn, librojn pri la sama temo. Klasifikadon faradis de majo ĝis fino de 2008 skipo konsistanta el A. MARTINS-Tuválkin, Eduardo CRISPIM (✍), Wilson BRÍGIDO kaj Alcino ALVES. Anstataŭe de ĉi lasta skipaniĝis A. Silva ALMEIDA, kaj depost 2009 poiome oni komparas tion kio staras surbrete kontraŭ la libro-listo, kun samtempa prinotado (kaj laŭbezone korekto) de la temo de ĉiu libro (ekas la fazo 2-a). Faratas multaj detalaj korektoj, plena klasifiko laŭ temoj, kaj forigo de nelibroj — periodaĵoj, sonregistraĵoj, k.s. Verŝajne 2012 vidos la finon de tiu reordigado, kaj ekon de normala, finfina, funkciado.

La kontrolo de mankoj estos farata per komputile kreitaj bret- kaj tem-listoj. Restas decidote pri duplikatoj, kopioj, pruntoj kaj konsultoj — pri tio estas bone koni la opinion de la publiko de nia biblioteko, t.e., la vian. **AMT**



Eduardo CRISPIM konfirmas kaj enklasigas, ĝis malpleniĝo de la lasta breto.

SIDEJO:

Majfine en 2011 vizitis ni an sidejon eĉ dufoje **speciale dungita purigistino**, kies prizorgo longe necesadis. Subvenciis tiun ĉi iniciaton asocianoj 1362 kaj 0275. *AMT*

HOMOJ:

Alcino ĉeas post pluiro

Meze de 2008, la sciigo flanke de Alcino ALVES ke, jen post 15 jaroj, li ne pretas plu sekretarii en la estraro, ĉiujn panikigis. Alcino ekaktivis kiel novesperantisto en 1986 (kasisto de 1988 al 1992) kaj unike senpaŭze subtenis nian Asocion per siaj persisto, talento, klerco, rigoro, kaj absolute fidinda laborkapablo.

Ĝojigas tamen konstati ke tiun decidon kaŭzis pozitiva ŝanĝo en lia privata vivo (inkl. revenon al iama hejmurbeto), ke finfine lian gravan postenon eblis kontentige okupigi (pĝ.2), kaj ke lia ŝatata ĉeesto kaj kunlaboro ne mankas en esperantaj eventoj — kiel ĝueblis i.a. en la du postaj Zamenhoffestoj (pĝ. 9,10). Amiko plu, for de polvaj dosieroj sed ĉiam en niaj koroj! *Ancxjo*

ASOCIO:

Ĝ.A. pri kotizo kunvenis ekster-ordinare & -sideje

Kiam la estraro de P.E.A. ekvolis plikostigi la kotizon dum sia kunveno de 2008.07, en Koimbro, ĝi decidis proponi al la **Ĝeneralasemblea** stabo okazigon de **eksterordinara kunveno** dum la 24-a R.P.E. en Alkoŝeto (pĝ.8), anstataŭ atendi ĝis marto sekvjara. Oni celis profiti la kuneston de multaj membroj kaj eviti prokrastojn: Plikostigo aprobita **oktobre** ekvalidus januare de 2009, sed aprobita marte ĝi ekvalidus nur januare de 2010. Preskaŭ neremarkita estis la statuta (pĝ.24) preskribo ke la Ĝ.A. kunvenu nepre nur en la sidejo (art. 18 §2) — ekster ĝi nur pro «manko de kondiĉoj» kaj nur lisbone aŭ en «limanta municipo». Tiu postulo (cetere devigita de la ĝenerala leĝo pri asocioj, ne specifa de P.E.A.) celas defendi la membraron de kunvenigo en malice neatingeblaj ejoj (por ke astronauta kliko ne ekregu la asocion kunvokante al Ĝ.A.-kunveno sur la Luno...); ŝirmita de konvinko pri sia bona intenco, la estraro ĉirkaŭiris tiun regulon per tio ke la Alkoŝeta Municipo efektive limas kun tiu Lisbona, eĉ se laŭ surrivera limlinio, kaj ke ja mankas kunvenkondiĉoj en la sidejo se la membraro samtempe renkontiĝas aliloke.


Ne tiel opiniis asociano João José SANTOS kiu, en la asocia retroŝta forumo, verve pridubis la laŭleĝecon de tiu kunvoko («Seriozeco kaj respekto al la propra leĝo de PEA pli gravas ol ruzaj argumentoj.»), sekve de kio la estraro publikigis en 2008.08.14 samforume instrukciojn por eventuala nuligo de la okazonta asemblekunveno flanke de malkontentaj asocianoj. Finfine la kunveno pasis, la kotizplikostigproponon ĝi aprobis, kaj ne nuliĝis tiu decido. *AMT*

Depost 2009.01.01 la kotizo estas do 3,00 € monate. Laŭ la koncernaj regularoj (*NB86:7 §3; NB66:6 §6-§8*), la baza kotizo devas esti entjere trionigebla nombro da eŭrdekonoj — do el 3,00 € ĝi nur povos aŭtomate plikostiĝi al 3,30 € (+10%), kio verŝajne ne okazos ĝis 2013, pro la intertempa inflacio (2009: -0,8%; 2010: +1,4%; 2011: +3,4%?). *AMT+JMM+VLM*

ASOCIO:

Ĝ.A. 2009 dekope

Ankaŭ en 2009 la Ĝeneralan Asembleon oni kunvokis al ordinara kunveno implicite, laŭ statuta art.23 §2 (ĉipĝ.). Eĉ tiel estis neoficialaj avertoj kaj alvokoj, flanke de la estrarprezidanto — al kiuj finfine reagis nura deko da asocianoj (↓ plus nefotitaj Wilson kaj Tuválkin). La sesion prezidis Iuri GASPAP pro malesto de Faria de BASTOS kaj estis aprobitaj la estraraj raportoj pri 2008 kaj la gvidantaro por 2009-2010. En ĉi lasta elstaras la kasistiĝo de Vítor MARQUES, longe en la Kontrolkomitato, kaj la unua-foja estraraneco de du esperantistinoj. **AMT+IG**



Dekestren, ĉirkaŭtable: Iuri, Antónia, Cardoso, Jozefo, Jaime, Boieiro, Valério, Pedrosa.

ASOCIO:

Trankvila sesio

La Ĝeneralasemblea kunveno en **mar-to 2010** estis grandparte seneventa. Kiel kutime en lastaj jaroj, la neapero de *Nia Bulteno* devigis la “aŭtomatan kunvokon” (*), fortigitan per tamena dissendo de ĝi pere de retroŝto (fuŝe datumita de 2005...) kaj telefono — al kio reagis per sia ĉeesto eĉ 13 asocianoj. Antaŭtagorde estis laŭtlegitaj kaj aprobitaj entute kvar antaŭaj protokoloj, amasiĝintaj el la pasintaj kunvenoj.

(*) Laŭ la Statuta art.23 §2, la Ĝenerala Asembleo nepre kunvenu ordinare la lastan sabaton de marto ĉiujara se ne laŭregule kunvokita por alia dato.

Gvidorganoj de P.E.A. 2009-2010

(La nunajn sur pĝ.2.)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:

Prezidanto: M. Faria de BASTOS

Sekretarioj: Antónia CARVALHO

Iuri GASPAP

Estraro:

Prezidanto: José MARTINS

Vicprezidanto: Wilson BRÍGIDO

Sekretario: A. MARTINS-Tuválkin

Kasisto: Vítor MARQUES

Voĉdonantoj: Alexandra PAZ

Nádia PENAS

Nuno MAGALHÃES

Kontrol-Komitato:

Prezidanto: A. Silva ALMEIDA

Revizoroj: Rui Queiroz VALÉRIO

Francisco MELO

La tagordo enhavis kiel solan punkton la analizon de la estraraj raportoj, kio okazis post kelkaj detalaj pliboniĝoj en la teksto (proponitaj plejparte de estraranoj mem), kaj sekvis ekstertagorda debato pri la asociaj agado, ŝanĉoj, problemoj kaj defioj. Dum tio estis proponite de João J. SANTOS (cetero oficanta kiel stabprezidanto pro malesto de ĉi tiu) ke okazu baldaŭ kunveno de la Ĝenerala Asembleo por specifa diskuto pri instruado, kion la estraro tuj pretiĝis simpligi (§).

(§) Laŭ la Statuta art.22 §2, ajna membro povas proponi al ties Stabo okazigon de eksterordinara kunveno de la Ĝenerala Asembleo, se tion skribe apogas 19 aliaj anoj, sed ankaŭ la estraro rajtas tion peti, senbezono de tia amasubsteno.

ASOCIO:

Sidejkurspropono kaŭzas kverelon!

La **eksterordinara** kunveno de la **Ĝenerala Asembleo** de la 29-a de **majo 2010** estis proponita de la estraro al la Ĝ.A.-stabo laŭ peto de asociano João José SANTOS (JJS), ŝparante al li la ĝenon mem arigi aliajn 19 samemajn asocianojn (pĝ.21). La anoncita tagordo estis diskuto pri la instruado de esperanto, sed jam antaŭ la kunveno mem publikaj retpoŝtaj diskutoj evidentigis interpretdiferencon inter la estraro (ja la kunvenproponinto) kaj JJS mem: Ĉu ĝenerale diskuti pri instruado de esperanto, aŭ pri specifa propono?

Dum la sesio, okazinta la 29-an de majo 2010, pro malesto de Miguel Faria de BASTOS (MFB) necesis elekti porokazan anstataŭanton: mankis volontuloj krom JJS mem, kaj li kaj prezidis kaj prezentis detale la tagordan punkton, kies teksto estis ĝis tiam nekonata. La ĉeestantaj estraranoj tre ŝokiĝis kiam estis legita la proponata decido (☞): Ne tiom pro la objekto de la propono — kunordigo kaj responsiĝo pri instruado en la sidejo (kvankam oni miris kial tion fari sideje kaj ne tutlande, kiel pli efika aliro), sed pro la funkciaj detaloj, nome la proponata senresponsigo de la estraro. Tio kaŭzis malkoherajn reagojn ĉe pluraj estraranoj, sed prezidanto José Manuel MARTINS (JMM) klaris: Okaze de efektiva aprobo de tiu senresponsiga decidpropono, li eksigis. Eĉ tiel, kaj post disputveka decido de la siesiprezidanta JJS malakcepti la voĉon de unu 11-jaraĝa asociano, la propono es-

PROpono:

Ekde nun, la responsulo pri la esperanto-instruado en la sidejo de P.E.A. estas la P.E.A.-ano João José Mendes Quitério dos SANTOS. Por tio, la estraro kaj aliaj organoj devas disponigi la eblajn rimedojn al li. Neniu ago rilate instruadon en nia sidejo povas okazi sen la permeso kaj estrado de ĉi tiu responsulo. En ĉiu ordinara sesio de la Ĝenerala Asembleo, la PEA-ano João José SANTOS devos prezenti raporton pri lia »(tiel)« agado kiel responsulo de tiu departemento de P.E.A.

João José SANTOS

Aprobata en eksterordinara kunveno de la Ĝenerala Asembleo en 2010.05.29; post analizo malaprobata de la stabo de Ĝenerala Asembleo pro kontraŭstatuteco (art. 27 §a) en 2010.07.28.

tis aprobata (!), kio per si mem pensigis kaj agigis la estraron pri la afero instruado (NB88:5; NB90:14; pĝ.25).

Jam post la formala fino de la kunveno estis demandite al JJS kial lia propono tiel celas eskapi el la estrara kunordigo — ja dum lia oficiala instruagado ĉe P.E.A., kiel departementestro en 1987-1992 (NB55:25) kaj sporade poste ĝis 2000, neniel la estraro entrudiĝis malhelpe, eĉ male —, al kio li respondis ke lia malfido ŝuldiĝas al tute senrilata malrekomendo al U.E.A. pri lia enposteniĝo kiel ĉefdelegito, flanke de estrarano António MARTINS-Tuválkin (AMT): «rilate la kandidatiĝon »(...)«

(!) **Ĉeestoj kaj balotoj:** Antónia CARVALHO (jese), José Eduardo CRISPIM (nee), António S. ALMEIDA (jese), João José SANTOS (jese), Jaime CORREIA (jese), Joaquim Feijão PINA (forit.), José Manuel MARTINS (nee), Marta MARTINS (nee, rifuz.), Rui Q. VALÉRIO (sind.), A. MARTINS-Tuválkin (nee), Wilson BRÍGIDO (nee), M.^a Salete Santos (jese), M. Eusébio dos SANTOS (sind.).

al la ĉefdelegiteco de UEA en Portugalio. La nuna kotizperanto de UEA en Portugalio volis transigi la postenon al mi, kaj mi volis preni la ĉefan delegitecon »(...)« sed la estraro de PEA tion malaprobis» (pĝ.18; *LK15:3*).

Dum kelkaj monatoj post la kunveno diskutado pluis en la asocia retroŝta forumo, kun plusendo al aliaj, nome al tiu de *La Karavelo* (pĝ.27) — kie konsultebas por detalemaj interesatoj.

Julie estis publikita, ankaŭ retroŝte, decido de Ĝ.A.-stabestro, advokato M. Faria de BASTOS: Ĝi nuligas la aprobon okazintan dum la maja sesio pro kontraŭstatuteco (pĝ.24) de la propono — nome pri la (nefordoneblaj) devoj de la estraro, i.a. tiu pri lernigadkunordigo (art. 27 Ŝa).

Aperis libro-forme en oktobro 2010 dramo de JJS (*La Ĝenerala Asembleo — Unuakta tragikomedio*. La Karavelo: Estremozo, 2010. 44 pĝ. A5. 11,00 €. ISBN 978-989-96312-3-6) en kiu li priverkas la sesion el sia vidpunkto (?) — per la kaŝnomoj elektitaj por la roluloj kaj ties priskriboj konjekteblas la enhavo: I.a., MFB estas “Finito Bandito” (3), kaj AMT “Najlo Kanajlo” (4), dum JMM, “Johano Banano” (5), estas homo «tro mola kaj malagema »por« estrado de asocio». Prefacis kaj reviziis la usona literaturisto Cindy McKEE. **AMT**

(?) Prezentita en *Parolu, Mondo!*, retransmisio de Djalma PESSATA (<http://parolumundo.com/2010/10/9a-de-oktobro-2010/>); legeblas provversio ĉe http://cindymckee.com/librejo/JJS_La-Ghenerala-Asembleo_tragedikomedio_provversio.pdf. Ne havebla ĉe la Libro-Servo de P.E.A. pro ties rifuzo ĝin disvendi, sed legebla en la asocia biblioteko, al kiu la aŭtoro donacis.

(3) Kp. *NB54:17* i.m.a.

(4) Kies filino nomatas “Saro” — tio ŝajne subtile kunligas diakrone la figuron de AMT kun tiu de alia jama/iama antagonisto de JJS (i.a. *NB54:17*, *NB65:16-21*).

(5) Hipokatastazo reuzita (*LK17:21*; kp. *LK14:3-4*).

ASOCIO:

Nekutime banala

La alvokon por la Ĝeneralasemblea Kunveno de 2011, okazonta laŭstatute sideje la lastan sabaton (26-an) de ĉiu marto, ricevis la asocioj retroŝte, telefone (tiuj nekontakteblaj retroŝte), kaj letere (same pri telefono), la lastan semajnon de januaro. La tagordo enhavis pritrakton de jarraporto, elekton de novaj organoj por 2011-2012, kaj «aliajn temojn». Nekutime ĉeestis asocioj kiuj estis ricevintaj prokuron de aliaj, neĉeestantaj, kaj tial la decidojn elektis naŭ voĉoj, malgraŭ ĉeesto de nura seso da asocioj.

Same nekutime la jarraporto estis prezentita voĉe de estrarano MARTINS-Tuválkin, kaj poste diskutita; kompanse kaj kontraste kontraŭporton kasisto Vítor MARQUES disdonis plurekzemplere por analizo kaj ĝian ĝustecon la Kontrol-Komitato estis jam aprobinta.

Malgraŭ nekutima alvoko ankaŭ al kandidatigo, elsendita ambaŭlingve de la du organprezidantoj (Faria de BASTOS kaj José MARTINS), unusola kandidataro prezentiĝis kaj estis senplie elektita (pĝ.2). Kiel ŝanĝoj (kp. pĝ.21) notindas la reveno de Iuri GASPAS al la estraro (iam en 2001-2002), kaj fino de la deĵoro de Faria de BASTOS en la asemblea prezidanteco, de li mem longe petita pro plejofta foresto angole.

Fine, oni diskutis pliajn aferojn, i.a. la katalogon de la Libro-Servo (pĝ. 30), retan vendadon de ties varoj, kaj la eblecon vidigi esperanton publike: kaj en amasinformiloj kaj okaze de nemovadaj aranĝoj, kiel la tiam okazonta barejra babilsesio (pĝ.12). **IG+AMT**

ASOCIO:

Statuto haveblas

Depost la 23-a de junio 2010 la *Statuto de Portugala Esperanto-Asocio* publike kaj libere haveblas al la membraro ĉe <http://esperanto.pt/dok/statuto.pdf>. Laŭ la priasocia portugalia leĝo, ĉiu asocio devas ricevi ĝin, kaj do al ĉiu estos laŭpete ekspedita aŭ enmanigita ekzemplero ekde septembro 2011, escepte de esprimitaj malvoloj (tipe tiuj membroj al kiuj sufiĉas la menciita pdf-dokumento). Tiucele la Libro-Servo ĝin disponigas kiel varon (★07.010: dekdupaĝa A5-formata broŝuro kun grizviola kovrilfolio); al neasocianoj kaj al asocianoj volantaj pliajn ekzemplerojn ĝi koston po 1,00 €.

Statuthistorio

Rimarkinde mankas historiaj detaloj pri la du unuaj statutoj, en 1970-1972 kaj 1974, dum multaj bone memoras pri 1989. Laŭvicaj forpasoj (pĝ.17) akre memorigas pri tio, kiom urĝas flegi nian memoron kaj registri la voĉojn de nia historio.

La unua statuto de nia asocio estis aprobita okaze de ties fondo en 1972, kvankam pli frue versioj de ĝi estis senditaj por aprobo al la tiam registaro. La asocia arkivo havas registron pri tia submeto en 1970.03.16 kaj 1971.11.03. La definitivan redakton oni kompletigis en **1972.02.22** kaj aprobis en Ĝenerala Asembleo.

Laŭbezone tiu unua statuto de 1972 enhavis kelkajn politikajn konsiderojn kiujn la Dianta Revolucio igis forigeblaj. Tio rezultigis novan Statuton, aprobitan en **1974.10.05** en Ĝenerala Asembleo (malabundas dokumentoj

pri la proceso en la asocia arkivo: Nure presitaj ekzempleroj kun aprobindiko, kaj la protokollibro).

Ties ankaŭa politikeca balasto estis unu el la kaŭzoj por tria teksto, preparita 15 jarojn poste. La statutan renovigon aŭtoris João SANTOS kaj leĝe reviziis Faria de BASTOS. Ĝi estis submetita al la Ĝenerala Asembleo en 1989.03.18 kaj, post pluraj kunvensesioj, estis finfine aprobita en **1989.07.01**.

Modifojn pri necesaj detaloj la Ĝenerala Asembleo aprobis en 1993 kaj 1994 por taŭgigi la statuton al la postuloj de la tiam petita kaj atendata Statuto pri Publika Utilo (NB76:4-5).

Eldonita 16 jarojn poste...

Tiu estas la teksto nun finfine eldonita por senpaga poa dono al ĉiuj membroj kaj vendo al ĉiaj interesatoj.

La tajpadon preparis en 2008 Vítor MARQUES kaj ĝin reviziis Alcino ALVES; kompostis la nunan eldonaĵon MARTINS-Tuválkin.

La teksto estas la portugallingva originalo; estus interese krei ĝian esperantan version.

Planatas pli vasta eldonaĵo, kun aldono de la kvar internaj regularoj intertempe aprobitaj, kiuj kompletigas la Statuton (laŭ ĝia teksto en art. 7, 10§b, 12§b, 14§1, 27§j, 28§1, kaj ĉefe 20§e) — tiuj pri la bulteno (NB38:2; NB76:2), pri membreco (NB66:6), pri kotizinflacio (NB86:7), pri la Junulara Sekcio (NB66:9), kaj pri la lokaj sekcioj (NB80:3). Tamen tio ke la Statuto estas oficiale portugallingva kaj la internaj regularoj estas esperantlingvaj kreus hibridan dokumenton **Estatutos & Regularoj*, kiu do atendas prilaboron de ambaŭflanka traduko. **AMT**

LERNADO:

Veteranoj lisboniaj e-on lernas plu

En la mita lisbonia urbo **Barejro** (pĝ. 12) loka pensiula libertempa kursejo **UTIB** (*Universidade da Terceira Idade do Barreiro*) disponigas ankaŭ esperanton. La kurson gvidas lokaj veteranaj esperantistoj **Luís DUARTE** kaj **Artur OLIVEIRA.**, uzante *Esperanto para principiantes* (libron kaj CD-diskon), de Aloísio SARTORATO. Komence de la pasinta kursjaro aniĝis 28 lernontoj, i.a. instige de la prelego de João SANTOS (pĝ. 12); okaze de la rekomenco somerfine dekdu el tiuj transiros al la nova kursjaro 2011-2012 (interese kvin en tre bona nivelo), dum ankaŭ novaj atendas por la tria jaro de la nuna kursserio. ☎ 212 170 909. **AMT+AO**

En *Academia Cultural Saudação* (iam pli ofte nomata "**Saluton!**"; NB41:4-6,11) instruas esperanton **Eduardo CRISPIM**, anstataŭanta ekde 2009 la antaŭajn Eusébio SANTOS, A. S. ALMEIDA, kaj Gonçalves PIRES. Dum la nova kursjaro 2011-2012 ĉeestos daŭrigan kurson la 5 komencintoj de la antaŭa jaro, «tre bona grupo». Por eventualaj novuloj estos kreita nova grupo, komenciĝonta ankaŭ en oktobro, en ties nova lisboncentra sidejo. ☎ Av. Mq. Tomar, 68-1.º esq.; PT-1050-157 LISBOA. **AMT+EC**

En la **lisbona** pensiula klerigasocio **Sonho Perene - Associação do Cidadão Jubilado** instruos esperanton dum la kursjaro 2011-2012 la senlaca **Mário Eusébio dos SANTOS** (eksiĝinta en 2009 el la de li fondita kaj longe gvidata Kooperativo "**Saluton!**", vd. supre). Tio jam es-

tis ofertita pasintjare sen sufiĉa aniĝo, sed el la dume grandiginta centhoma anaro esperatas novinteresiĝo pri esperanto, el inter ĉ. 15 proponotaj fakoj. ☒ Av. João Crisóstomo, 32-2.º esq.; PT-1050-127 LISBOA. **AMT+MES**

Post la unua R.P.E. en **Alkoŝeto** (NB76:10;NB77:3) ekis en 2001 kurso en *Escola Comunitária de Alcochete*, komence gvidata de **Cosme RESINA**, poste de geedzoj **Boieiro**. El ĝi ekis la Amikeca Grupo, kun ĉ. 6-8 homoj. **AMT+MB**

Post sukcesa kurso en 2007-2008, ne pluis la instruado de esperanto en *Usalma* (*Universidade Sénior de Almada*: NB88:7 kaj NB90:14): La ok eklernintoj malgraŭvole ne havis eblecon plu ĉeesti la sekvan jaron kaj la kursestro **Wilson BRÍGIDO** mem ne povis preti por novula kurso. Restis tamen intereso ĉe la lernejestro reokazigi kurson kaj la sperto ripetigiĝos en 2011-2012 se trovblos ema instruisto; interesatoj kontaktu wilson@esperanto.pt. **AMT+WB**

LERNADO:

Sidejaj kursoj (pág.36)

Spronite i.a. de la defio implicite prezentita dum la Eksterordinara Ĝ.A. de 2010.05 (pĝ.22-23), novaj sidejaj kursoj ekozokas por la studjaro 2011-2012. Estos klasoj en tri niveloj, kiel kutime, kun ekzamenoj por aliro al la dua kaj tria (por memlernantoj kaj jamaj bazkaj mez-nivelaj kursanoj). Prizorgas la proceson A. MARTINS-Tuválkin (kontaktoj kaj klasanarigo), Alexandra PAZ (ekzamenoj), kaj Nádia PENAS (kunordigado). Jamaj agadoj estos kunordigitaj (NB90:14). Interesatoj kontaktu telefone aŭ lernado@esperanto.pt. **AMT**

LERNADO:

Novajn lernilojn

La relative vasta paletro da esperanto-lerniloj por portugallingvanoj riĉiĝis en la lastaj jaroj per kelkaj aldonoj: Krom la neelĉerpebla torento el Brazilo (*) publikiĝis antaŭ nelonge *Esperanto em 30 horas* (João José SANTOS; La Karavelo: Estremozo, 2009; 300 pĝ. 208×146×18 mm; ★02.058 je 25,00 €; ISBN 978-989-96312-1-2), *Esperanto em método ilustrado* (Stano MARČEK; I. M. A. ÁVILA (trad.); Marteno, 2007; 114 pĝ. 175×250 mm; ★02.062 je 9,50 €; ISBN 80-9696671-4), kaj *O Esperanto é fixe* (João José SANTOS; La Karavelo: Lisbono, 2011; 44 pĝ. 297×210 mm; ★02.063 je 11,00 €; ISBN 978-989-96312-1-2) — ĉiuj haveblaj en la asocia vendejo. *Esperanto em 30 horas* estis lanĉita dum publika sesio en Estremozo (kafejo *Até Jazz*, 2009.11.17; pĝ.14) kaj prezentita kadre de diversaj informagadoj (i.a. pĝ.12). Per ĝi donackampanjo iniciate de la aŭtoro subtenis kurson en Luando (*LK 23:3*, *LK21:5*), kaj ĝi konsideratas por baldaŭa sideja kurso (pĝ.25). **AMT**

(*) Vd. <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?trovu=Trovu&lingva=portugala>.

LERNADO:

Kurso Estremoze

La unua baza kurso de esperanto okazigita en Estremozo ekis la 20-an de **aprilo 2009**, instruate de João José SANTOS en klasĉambro de la loka mezlernejo, per praa fotokopia versio de *Esperanto em 30 horas* (ĉipĝ.). Ĉeestis ĝis la fino, julie, ĉiuj tri aniĝintoj (averaĝa aĝo: ĉ. 42j), kiuj akiris tre bazan scion pri esperanto kaj pluigas ĝis nun sian lernadon kaj praktikadon. **AMT+JJS**

LERNADO:

Oficialiĝonte pro persisto +ukulelo!

Tiurba esperantisto kaj asociano Antónia CARVALHO plu senlace informadis pri esperanto en *Figueira da Foz*, sekve de la inspira 23-a R.P.E. (**NB90**: 8-9): Post arigo de interesatoj, novuloj kaj eĉ foriĝinta veterano (restintis nur du el la 2007-a grupo) venis tempo por formala kursintruado. Fronte al la skeptika malvolo de *Associação Viver em Alegria* (loka pensiula akademio) aldoni esperanton al sia kursaro komence de la 2010-2011-a instruaro, la interesatojn ŝi kunvenigis en kafejo ĝis la konvinkita lernejestraro disponigis klasĉambron kaj iel integrigis esperanton en sia kursaro. Tiam, januare de 2011, grupano Odete TEIXEIRA deklamis, dum tagmanĝo de AVA antaŭ ĉirkaŭ 100 homoj, tradukon de brazila popola poemo *Floroj*; tiun persistemon kronis prezento de esperantlingvaj kantoj (*Katjuŝa* kaj *Branĉo bela*) kun i.a. tamburina kaj ukulela (*) akompano okaze de la junifina fermfesto. Tiun tre ŝatis la publiko, kiu favore ĝin komparis kun alikursaj prezentoj. Sekve, esperatas pli formala apogo flanke de ASA okaze de la kurskomenco en oktobro 2011 (malgraŭ riparlaboroj kiuj ĝenos ĉiujn kursojn). Krome, estrarano Wilson BRÍGIDO vizi- tis invite la grupon julie, por senferia plutrejnado kaj babilo. **AMT+AC**

(*) Ĉi mondkonatan gitareton portis al Havajo deknaujarcentaj portugalaj sukerkanaj kamplaboristoj, kie ĝi alprenis modifojn kaj lokan nomon; en la portugala lingvo ĝi estas nomata *cavaquinho* (signif. laŭvorte ŝtipeto aŭ rabotaĵo). Kelkaj portugalaj kaj brazilaj esperantistoj preferas nomi ĝin per propra radiko.



ELDONOJ:

La Karavelo holdo-plena

La jarojn 2009 kaj 2010 la portugalia esperanto-eldonejo "La Karavelo" (NB90:7) plenigis per senĉesa aktivado (ankaŭ reta: <http://www.lakaravelo.co.cc/>). Krom la inform-kaj instru-agadoj entreprenitaj de ties estro João José SANTOS (pĝ.12,14,26), aperis 12 numeroj de la samnoma literatura revuo (plus 3 en 2008.08-12)(*), kaj pluis eldona agado (pĝ.26,31,33) kiu ne ĉesos: Aperos ĝis la jarfino almenaŭ tri pliaj titoloj: Dulingva spiritisma eseo pri Camilo CASTELO BRANCO, la premiita teatraĵo *Aŭtodafeo* (pĝ.31), kaj *La Mesaço* de Fernando PESSOA, polurita post felietona publikigo en *La Karavelo*. Ĉi lasta cetere travivis ŝanĝojn: Subita ĉeso de la estrema urba subvencio (laŭdire pro intervjuo en *LK* al loka modelino!) kaj aliaj konsideroj (*LK*20:4-5) decidigis aliigon de «beletra esperanto-revuo pri la portugallingva literaturo» al «internacia kultura magazino en esperanto». **AMT**



Eldonaĵoj de *La Karavelo* en 2008.08-2011.08 (⇒): dekse n-roj (10-25) de *La Karavelo* (magazino), ties detala indekso, movadtema dramo *La Ĝenerala Asembleo*, du esperanto-lerolibroj por portugallingvanoj: O Esperanto é fixe kaj Esperanto em 30 horas, *novelo* *Liberaj Tempoj*, *rakontaro* *Rakontoj por ĉiuj aĝoj*, *kaj portugallingva dokumenta filmo sur DVD-disko* *Zamenhof: Um cidadão do Mundo. Kp. 2007.10-2008.07, NB90:7.* (*) Sekvaj numeroj ekde 2011.09.

LITERATURO:

Silfer kaŝe inter ni

En la retejo de la Esperanta Civito (*) estis anoncote ke «Giorgio SILFER prezentos la esperanto-literaturon al la membraro de la Portugala PEN, en Lisbono meze de **novembro 2008**, laŭ invito de la portugala centro mem.» Kontaktinte la portugalan PEN-klubon cele al ebla kunlaboro de P.E.A., ni ricevis sciigon ke la planitan prelegon anstataŭos nura laborkunsido. Vicprezidanto TERESA SALEMA aldonis iom sibile ke «*Segundo me foi dito pelo próprio dr. Giorgio SILFER, este virá a Portugal no âmbito de um colóquio, de que não temos mais informações. Estamos porém seguros de que V. Exa. não terá dificuldade em ob-*

ter mais pormenores, se não se encontrar já na posse dos mesmos.» Ŝajnas do ke la tamen neokazonta PEN-evento vualita por esperantistoj ĝemelis kun kolokvo pri kiu PEN-estroj ne sciis detalojn sed suspektis esperantista — kaj ambaŭ ŝajne neniam okazis...(*)

Notindas ke Portugala Esperanto-Asocio (en kies sidejo li ŝatate prelegis en 1992.01: NB55:12) ne estis kontaktita por okazigo de ajna evento, kvankam tian inviton («en formo de literatura kafejo») Giorgio SILFER tamen direktis al *La Karavelo* — kiun ties redaktestro malakceptis, pro jamaj engaĝoj. **AMT**

(*) Ĉe <http://www.esperantio.net/index.php?id=701>, HeKo 372 2-B, kie mallklare eblas kompreni ke la prezento de Silfer ekskluzivas por PEN-anoj. La fuŝligita «antaŭpremi-era prezento de la tria poemlibro» restas mistero.

(*) Nepre memorigas pri la 24-a verso de *Tiuj kiuj...*

LINGVO:

Ĉe ni verkata la unua historia vortaro!

Nia kunlaboranto Gonçalo NEVES verkas la unuan *Historian Vortaron de Esperanto* (ĉi-sekve HV). Historia vortaro estas ampleksa konkordanco de la tuta lingvouzo dum difinita periodo, en kiu dokumentiĝas antaŭ ĉio (sed ne nepre nur) la plej frua uzo de ĉiu vorto (tute egale, ĉu temas pri radiko, derivaĵo aŭ kunmetaĵo), kun indiko pri ties aŭtoro, verko kaj paĝnumero. HV estas do PIV-aspekta vortaro, tamen sen difinoj (krom ĉe radikoj ekster-PIV-aj) kaj kun rigora citaĵa referencaro (malkiel PIV, kiu svage indikas aŭtorecon nur per supermetita "Z", "B", k.c.). Per HV oni do povas facile ekscii, kiu/kiam/kie unufoje uzis ĉiun vorton en difinita periodo. Ekzemple, jam nun HV montras, ke la unua nezamenhofa radiko estas "mebl-" (lanĉita de Leo BELMONT en 1888), kaj ke la radikojn "ĉef-", "ĉapitr-", "kontor-" (i.a.) enkondukis ne Zamenhof sed Leopold EINSTEIN, fama eksvolapukisto. Per HV oni ekzemple ekscias ne nur kiu/kiam/kie lanĉis la radikon "am-", sed ankaŭ kiu(j)/kiam/kie iniciatis ĉiun ĉi-radikan derivaĵon kaj kunmetaĵon (aminda, amindumi, enamiĝi, geamantoj, gastama, k.t.p.).

La ideo kunmeti tian vortaron unufoje venis al li en la kapon komence de 2003 kiam, verkante detalan artikolon pri la vorto "ambaŭ" (1), li devis okupiĝi i.a. pri ĝia historio. Helpe de taŭgaj referencverkoj li tre facile sciigis pri la unuafoja envortara uzo

de tiu radiko, sed li scivolis ankaŭ pri ĝia unua ekstervortara apero. Tiucele li devis paciencoj kaj pedante (2) tralegi la densajn kolumnojn de *La Esperantisto*, paĝon post paĝo, ĝis li trovis la deziratan lokon. Temis pri laboro neimageble teda kaj temporaba, kiun ŝparigus al li la ekzisto de vortaro, en kiu li povus facile kaj rapide trovi tiajpecajn informojn...

Tiu ideo fariĝis deziro, kiam li samjare konatiĝis kun ĉi-tema artikolo el la plumo de Haupenthal (3). En sia kontribuado la konata esperantologo ne nur prezentis detale la celojn, citmanieron kaj principojn de registrado de historia vortaro sed eĉ liveris 11-paĝan modelan fragmenton de ĉi-speca verko, elektinte tiucele fruan tradukon de Grabowski. Tiam Gonçalo komencis kolekti materialon kaj eĉ intencis tuj ekverki, sed pluraj cirkonstancoj de lia vivo igis lin ĉion plurfoje prokrasti kaj meti flanken, kaj nur somere de 2009 li komencis metode kaj sisteme traerpi la unuajn esperantajn inkunablojn kaj efektive ekredaktis la vortaron. Du jarojn treniĝis tia laboro, i.a. ĉar li plurfoje ŝanĝis gravajn redaktajn kriteriojn, ĝis fine lia esploro atingis la lastan dokumenton el 1888.

Baldaŭ aperos ĉe *Edition Iltis* la unua versio de HV kiel 117-A4-paĝa

(2) Portugallingvanoj atentu la difinon de pedanto en *NPIV*: «Homo tro precize plenumanta la regulojn; tro zorganta pri malgraviaj detaloj k rutina formo». Temas do pri falsa amiko...

(3) Reinhard HAUPENTHAL: "Ni bezonas historian vortaron". En: I. kaj R. Haupenthal (ed.): *Klaro kaj elasto. Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Fernando de Diego*. Edition Iltis: Schliengen, 2003. 422 pĝ.: 183-199.

(1) Gonçalo NEVES: "La Benjamenoj de nobela familio" *La Ondo de Esperanto* 100 (2003:2): 13-15. <http://www.esperanto.org/Ondo/L-neves1.htm>.

LINGVO:

Sin tro streĉis...

■ A. MARTINS-Tuváلكin

Okaze de vizito al la turisma oficejo de Sintro (*Sintra*) en 1996, mi scivolis ĉu ili ankoraŭ tiam havis ekzemplerojn de la esperantlingva prospekto eldonita en 1990 (*NB49:2*) kaj demandis:

«*Têm folhetos — em que línguas?*»

«*Temos em todas!*»

«*Então dê-me em russo.*» (Min tiam akompanis Irina (*NB70:23*), kiu povus ankaŭ ĝin utiligi, kaj mi ĉiukaze volis testi tiun babelan blufon — ke informojn ĉiu-lingve ili pridisponis, ĉu do ankaŭ ruslingve?...)

«*Ah, “essas” línguas não temos...*»

(«*Ah, ne “tiajn” lingvojn...*»)

Tiam ili ankaŭ ne plu havis la esperantlingvan prospekton, da kiu mi cetere kunhavis unu ekzempleron, tuj poste elmontrita al ilia miro.

(Portugaliajn esperantajn turismajn prospektojn ĉe <http://esperanto.pt/dok/turismo/>: unu pri Algarvo, eldonita en 1990 (*NB 50:2*), kaj alia pri Sintro, 1983 (*IL48:5*). Mankas ĉe ni tiu pri *Guarda* (*NB35:11*), 1930; pliaj informoj bonvenas.) ■

▶ kajero, koncernanta nur la periodon 1887-1888, sed Gonçalo plu laboras super la vortaro. Nun, kun la helpo de Valentin MELHNIKOV, li traerpas la unuan ampleksan vortaron nacilingva-esperantan, aperintan komence de 1889 (4). Kiom ni scias, li siajn esplorojn intencas daŭrigi ĝis almenaŭ 1900. **NL**

(4) Дрѣ ЭСПЕРАНТО: Полный словарь эсперантскаго (международнаго) языка. Часть русско-эсперантская / Plena vortaro rusa-internacia. Издание Л. Заменгофа: Варшава, 1889. xv+232+3 pĝ.

LINGVO:

E-on kiel sperton

Tri portugaliaj esperantistoj komentis jene pri la sperto prezenti esperanton kiel eron de sia kapablaro. Ĉu malfavoriga, konfuziga, seninflua? Intere-sus ekscii similajn spertojn, solvojn kaj koncernajn opiniojn ankaŭ de aliaj.

GN: Nur unufoje mi menciis esperantlingvecon en vivprotokolo prezentota al dunga firmao, kaj dum la sekva intervjuo mi devis respondi plurajn ĉi-tamajn demandojn, plejparte ironiajn, de suspektema funkciulo...

NM: Dum intervjuo ĉe IEFP (portugalia ŝtata servo pri dungado kaj profesia trejnado), jen dialogo inter mi kaj ties funkciulo:

ŝi: «*Kiujn lingvojn vi parolas?*»

mi: «*Nu, esperanton kaj anglan.*»

«*Esperanto? Ĉu tio estas lingvo?*»

«*...Jes.*»

«*Sed en kiuj landoj ĝi parolatas?*»

«*Plejparte de la mondo.*»

Ĉi-momente ŝi panikas, ŝajne esperanto ne listatas ŝia-ekrane.

«*Sed ĉu ĝi estas oficiala lingvo de iu lando?*»

«*Ne.*»

Aaaah, solviĝis la dramo por ŝi:

«*Ah, bone, do ĝi estas mortinta lingvo.*»

«*Laŭ IEFP...*» Eblis amuziĝi.

AMT: La fakto ke mi scipovas esperanton konstantas en mia profesia biografio kaj min neniam oni pridemandis pro tio. Ironie supozeblus ke sekve mian aĉan profesionan situacion tio mem kaŭzis, sed apenaŭ eblas kulpiĝi esperanton pro la centmiloj da sendunguloj en Portugalio... ■

ELDONOJ:

Finfine la dua Almejdo!

En 2005 (NB86:3), post elĉerpa disvendado de la vortaroj de A. S. ALMEIDA (NB76:7-8) — eldonitaj de P.E.A. en 1997 (NB73:7), kaj tenere nomataj “Almejdoj” far Luís Ladeira laŭ studenta kutimo —, necesis pensi pri nova eldono. Ne nur por aldonoj kaj korektoj flanke de la aŭtoro, sed ankaŭ pro la dume ne plu havebla manmetia dediĉo kaj lerto de Franco SIMÕES (NB76:6-7, 82:6, 83:10-11) kaj Rocha da COSTA. Sugestis estrarano A. MARTINS-Tuválkin ke P.E.A. uzu la tiam novan sistemon de unuopa, laŭmenda presado. Ekis tiam tipografia sagao kiu finiĝis nur ĵus, per la finfina havebligo (<http://www.lulu.com/product/14834137>) de la dua ero de la duopo: *Dicionário Português-Esperanto*, 858 pĝ., 36 mil kapvortoj, 1400 g, 32,00 €, ★04.037, ISBN 978-972-9471-37-7, kovrilo oranĝbruna — apud *Dicionário Esperanto-Português*, 365 pĝ., 15 mil kapvortoj, 580 g, 26,00 €, ★04.032, ISBN 978-972-9471-38-4, malhele verdblua (<http://www.lulu.com/product/14834137>), jam aperinta en 2010. Pliaj idoj de la zorgemo kaj precizeco de nia “kapitano”. AMT



ELDONOJ:

Ritmo rebrulas

Sagrada Esperança (originale eld. 1974) estas poema antologio de la unua angola ŝtatestro, ankaŭ kuracisto kaj poeto, Agostinho NETO. En 1987, laŭ iniciato de la *Norrköping*-klubestro Haldo VEDIN kun organizo de Hans BAKKER kaj de Spomenka ŠTIMEC, eldonejoj I.K.S. (Zagreb) kaj **Vulpo** (Lelystad) kune publikigis esperantigon fare de angola poeto Lutumba TIMA kun revizio de brito Kris LONG, titole *Brulo kaj ritmo* (ISBN 90-70074-34-6), 116-paĝa (NB 60:8-11). Ĝi reaperis represe en 2009, kun aŭtorvidvina permeso: Ŝanĝite, nur la multe pli bela kovrilo, kun pensista konturo sur verda landmapo, kaj la nova fideltraduka titolo *Sankta Espero*, eldonita de **AngEA** (Luanda) kaj aĉetebla ĉe nia Libro-Servo kontraŭ 9,00 € (kartonbind.) aŭ 7,00 € (broŝ.). AMT

LIBRO-SERVO:

Nova vendejestro

Estrarano Wilson BRÍGIDO gvidis nian Libro-Servon ekde la somero 2007 (NB 90:5) ĝis la komenco de 2011 kiam, jam vicprezidanto, li decidis apartiĝi de libro-eldonado — i.a. pro sekvoj de la Ĝ.A. de majo 2010 (pĝ.22-23) — kaj dediĉi al la respektindaj volumoj bibliotekaj (pĝ.19). Lian rolon en nia vendejo transprenis marte asociano Rui VALÉRIO, en kies manoj ektroviĝas burĝoninta sistemo: Surbaze de la komputila arkivo kreita jam antaŭe de A. S. ALMEIDA kaj (malrapide) evoluigita de MARTINS-Tuválkin, de la inventaro finfarita en 2009 (de ĉi lasta kaj de J. BAXOMBANA, i.a.), kaj de profunda reordigo en la vendeja ĉambro (pĝ.33), publikigis finfine en aŭgusto 2011 ankoraŭ provizora katalogo (papere, sideje, kaj ĉe <http://esperanto.pt/dok/katalogo.pdf>). AMT

LITERATURO:

EdNov reas per inspira novelo

Kiel ties tria libra eldono (pĝ.27), aperis en 2010 ĉe La Karavelo plia volumo el la plumo de Eduardo NOVEMBRO, la plej sukcesa originala prozisto eldonita en Portugalio. La nova verko, *Liberaj Tempoj*, estas unu tuta novelo, konsiderinde pli ambicia ol lia antaŭa ŝlagro (*Etaj Rakontoj*, du eldonoj; NB45: 14): 124 paĝoj A5, 3 prefacoj. **AMT**

En la personoj de la tri ĉefroluloj, Novembro admirinde spegulas la nuntempan sklavecon. Li faras sagacan kritikon en riĉa kaj simpla kaj plezuriga stilo, kaj tuj tute kaptas la leganton ekde la unua paĝo de la libro. La temo estas universala, bone adaptiĝas al la tuta mondo. **Cosme RESINA**

Per *Liberaj Tempoj* ni sekvas ĉiun paŝon de Marŝemulo, la taŭĝe kromnomita ĉefrolulo: Li ĉiam devas lasi la domon antaŭ sunleviĝo, por atingi la tre foran laborlokon en la koro de la urbo kaj li ĉiam revenas por sunsubiro — kiam ni, la legantoj, estas elĉerpitaj kune

kun li. Marŝemulo estas kondukebla obeemulo, kiu lernis per riproĉoj kaj eĉ batoj, ke oni sekvu instrukciojn de superuloj, ĉu ili estas superaj intelektulo, ĉu socinivele, ĉu fizikforte. Li sentas kunsorton kun la azeno, Skabelo, kiun li memoras de sia juneco. La aŭtoro lerte metas penson en la menson de la legantoj, ke Marŝemulo kaj Skabelo estas ambaŭ laborazenoj, kvankam li nerekte tion diras. **Cindy McKEE**

(el *Sennaciulo* 2010.07-08: 30-31)

La fizika malliberco de Marŝemulo ne kapablas malliberigi ankaŭ lian animon. Malgraŭ ĉio li sukcesas konservi sian bonkorecon, sian sentemon... fakte sian homecon. Kaj tio estas heroo, se ni komparas Marŝemulon, la balaiston, kun lia senkompata estro Baptopatro, aŭ kun la advokato kiu provas konvinki lin malobei la leĝon, aŭ kun la televidraportistoj kiuj lin intervjuas kliŝe kaj stulte. **Luiza CAROL**
(el *Liberaj tempoj*: 7-10)

Ni decidis fordoni la restantan kvanton da Etaj Rakontoj per triona rabato je kuna aĉeto (pĝ.36): Do ambaŭ libroj anstataŭ 16+8 = 24,00 € kostos nur 16,00 €, sama prezo kiel Liberaj Tempoj sola. **LS-PEA**

LITERATURO:

Aŭtodafeo ĝoana kun honora mencio

Julifine de 2011 publikiĝis la rezultoj de la Belartaj Konkursoj de U.E.A., laŭkutime aljuĝitaj dum la Universala Kongreso: Unua-foje konkursinte, la konata portugala esperantisto João José SANTOS ricevis **Honoran Mencion en la Branĉo Teatraĵo**, pro la dramo *Aŭtodafeo*. Kune kun ĉiuj aliaj premiitaj verkoj, ĝi aperos en la literatura

periodaĵo *Beletra Almanako*, redaktata i.a. de (mem iam premiito) ERTL István. João SANTOS estas nun la dua portugalo kiu entute ricevis laŭron (el kiom da konkursintoj?), post la abunda kaj plurbranĉa premiado al Gonçalo NEVES en 1991-1999. (En <http://esperanto.net/literaturo/bk/> plena listo de ĉiuj premioj, kun noma tajperaro.) **AMT**



Post la unua kunveniĝo de aŭtoro, tradukinto kaj la estraro en 2009, longaj teĥnikmotivaj prokrastoj malfruigis la aperon de tiu ĉi dulingva poemaro ĝis februaro 2011, kiam ĝi finfine havebliĝis por aĉeto en la reta butikoj de P.E.A. ĉe la laŭmenda presejo (“portugallingve”: *print on demand*) Lulu.

La poeto/aŭtoro estas Henrique MADEIRA — instruisto, intelektulo, konata aŭtoro premiita pri teatro kaj poezio. Li konatiĝintis kun esperantisto A. S. Almeida (NB76:7 i.m.a.) en Akademio

“Saluton!” (pĝ.25), kie ambaŭ instruistoj, kiam surbaze de la iĝinta amikeco formiĝis la plano eldoni paralele dulingvan volumon, antologie de lia poemarta verkaro. Almeida prilaboris la tradukon kaj, antaŭ la preta (eĉ entajpita!) teksto, la estraro de P.E.A. jesis la proponon ĝin publikigi librorforme.

Rave belan pentraĵon kreis speciale por la kovrilo pentristo H. MOURATO; ĝi trafas montras konstruaĵon kiu ŝajnas kaj ŝipo kaj babelturo; pendas ĝi nun donace sur sidejsaloneta muro. La libron ilustras interne nigre-blankaj desegnaĵoj de la sama pentristo.

La teksto estas strikte dulingva, en paralelaj paĝoj/kolumnoj, inkl. de la (iom kontraŭesperanta) prefaco, verkita de filozofo Pinharanda GOMES.

Formala lanĉo okazis majo 2011 en la salono de *Sociedade de Língua Portuguesa*, dum kiu rolis kiel deklamistoj el la esperanta parto la tradukinto kaj la kompostinto (A. MARTINS-Tuválkin), kun apogo de Wilson BRÍGIDO.

Tri monatojn poste estis jam venditaj ĉ. 70 ekz.; atendatas ankoraŭ recenzoj en ambaŭlingvaj periodaĵoj. **AMT**

Meridianos/Meridianoj Henrique MADEIRA; A. S. ALMEIDA. (trad.) 286 pĝ. 234×153×17 mm³ 15,00 € (09.022) ISBN 978-972-9471-36-0. <http://www.lulu.com/product/12196968>

ELDONOJ:

Hantas Mandaren' kaj sekvantar'...

En 1955-1957 aperis felietone en la “pra-P.E.A.”(*)-organo *Nia Stelo* (n-roj 2-19) esperanta traduko far Adolfo TRÉMOUILLE de la fantazihumura novelo *La Mandareno* (*O Mandarinim*) de la konata realisto Eça de QUEIRÓS. Nu-

(*) Portugala Esperanto-Asocio, registare malaprobita en 1955; posta akcepto venontis nur en 1972.

ne, same kiel la titola fatalviktimo, tiu verkaĵo mem reaperos el sia tombo en poŝformata volumo eldonita de P.E.A., laŭ iniciato de A. S. ALMEIDA. Tiu ĉi estos la unua el baldaŭaj reeldonoj: Preparatas ankaŭ *Sursablaj Floretoj* (NB83:9) kaj kuna volumo de “Enkonduko en la kulturon” (ELV9:4-5). **AMT**

✉ **Leter** ✉ **Amikoj** ☐

«Mi estas sesdekjara usonano (loĝanta en Kanado), kiu serĉas portugalon aŭ portugalinon por interŝanĝi per reto informojn pri niaj landoj kaj personaj interesoj. Bonvolu kontakti min se vi aŭ »iu el« viaj gekunuloj »« serĉas re-tamikon. Nek sekso nek aĝo gravas.»

Karlo

✉ charles.dockery@bell.net

26-jara studento, muzikema poligloto, kiu tre ŝatas nian landon kaj la portugalan lingvon, memlerninta esperanton en 2006, deziras korespondi pri diversaj temoj.

Kyle SINGHAL

✉ 100 North Lamar St. 662158
Fort Worth, TX 76102
ESTADOS UNIDOS ■

ELDONOJ:

Unua gastverkisto

La libro *Rakontoj por ĉiuj aĝoj* (166 pĝ., 210×148×10 mm³ 250 g ISBN 978-989-96312-0-5; 08.175 en nia Libro-Servo je 16,00 €), de la ruman-/uson-/israela aŭtoro Luiza CAROL, aperinta en 2009.07 ĉe La Karavelo (pĝ.27), premieras ne nur kiel la unua libro de tiu eldonejo, sed entute ĝi estas fakte la unua nia-landa eldono de esperantlingva literaturaĵo verkita de neportugalo (*). Kvankam la eldonisto, kiel ĉiam, afable donacis ekzempleron por la Biblioteko de P.E.A., indas aĉeti tiun ĉi do historian verkon. **AMT**

(*) Menciindas tamen la portugallingva traduko el MIYAMOTO Masao *Da Arte e da Morte*, fare de Manuel de SEABRA (177 pĝ., ĉe Futura: Lisbono, 1973). **NL**

SIDEJO:

Ilaron griznigran

En novembro 2007 la estraro sendis cikuleron al pluraj grandaj entreprenoj kaj institucioj petante ne plu uzatan komputilon (min. P4; 2 GHz; 1 GB). Manke de baldaŭaj jesaj respondoj, estis akirita marte de 2008 nova komputilo (NB90:15). Sed en 2008.09.21 telefonis oni el Fondaĵo Gulbenkjan. La sekvan tagon per veturigo de estrarano Wilson BRÍCIDO nova komputilo (griznigra *Compaq / Hewlett Packard* d530 SFF) eniris sidejen. Antaŭ nelonge la libro-serva komputilo estis paneinta kaj jam antaŭe ĝenerale maltaŭgis por ties dume evoluinta softvaro. La nova ilo tamen kuŝis apenaŭ uzata en la saloneto ĝis aprilo 2011, kiam ĝi ekfunkciis kune kun unu el la tri virgpake novaj monitoroj ĵus donacitaj de la Finanzministerio pere de Alexandre KASESA (same griznigra *HP* 7540), kaj kun skanil/printilo (ankaŭ griznigra *HP* psc 1350) donacita de João SANTOS en 2010. La tuto funkcias do en la Libro-Servo, konektota per lokreta kablo al la oficeja komputilo. Ĉi lasta, renovigita en aŭgusto 2011, estas deposedo mar-to samjara forkonektita per ligo senpage aldonita al nia telefona kontrakto (*PT empresas*; pĝ.4) kaj ties enkursigilo funkcios kiel lokreta nabo (kiu iam ligoŝos ĉiujn sidejajn maŝinojn). **Ancxjo**

LINGVO:

Frustru poleksa


Subteno de esperantaj signoj — fakte entute unikoda (pĝ.34) subteno — plu mankas por poŝtelefonoj, eĉ en la tute nova operacisistemo *Android*.) **Oks.**

LINGVO:

Klavaril' modifita

Ĉiuj uzantoj de la kutima portugalia 105-klava I.B.M.-kongrua *Windows*-klavaro, bone scias kiom simpla estas la "sekklava" sistemo, uzata por atingi literojn el la serioj "âêîôû", "áéíóú", "àèìò", "ãñõ", kaj "äëïöÿ". Multaj ne estas portugallingvaj sed ili tajpeblas senpene per tiu nia tipa klavaro (1).

Adapti al ĝi la saman funkciadon ankaŭ por "ĉĝĥŝ" (kaj laŭeble por tuta "à" ĝis "z", kial ne?) estas same evidenta ideo: Tajpi esperantajn literojn simple same kiel la portugalajn...

Ekz.: 

Jam plurajn jarojn tiel modifita klavarlegilo (ne klavaro mem, kiun ne necesas fizike ŝanĝi!) uzatas en la sidejo de P.E.A.: Ne per programeto kiu aldonas komput-"tavolon" al la sistemo, sed per rekta ŝanĝo de la klavarlega kernprogramo de la operacia sistemo, kaj ĝi funkcias en ĉiuj programoj okaze de ajna tajpado, sen pliaj zorgoj.

Necesis ja aldoni la hoketon "": Por tio estis elektita la *AltGr*-pozicio de la klavo de cirkumflekso/tildo, analoge al la tremao en tiu de asterikso/plus. (Jen ""-marko sur la klavo indus.) (2)

Ekz.: 

Ĝi funkcias por ĉiuj esperantaj literoj, kaj pro entuziasmo estis aldonita i.a. ankaŭ la miranda / praportugala "ŭ", krom diversaj tipografiaj signoj kiuj necesas sed mankas en la kutima klavaro: Longa dividstreko (en *AltGr*-streketo), la "tipografiaj" citiloj (en *AltGr*-citrilo kaj *Shift-AltGr*-citrilo), 'vera' apostrofo kaj malapostrofo (en *AltGr*-akuto kun kaj sen *Shift*) k.s.

Tiun ĉi ŝanĝitan klavarlegilon oni sukcese testis en la operaciaj sistemoj *Windows 2000* kaj en *Windows XP* — do verŝajne funkcias ankaŭ en *Windows 98*, *Windows Vista*, *Windows 7*, k.a. *NT*-bazaj versioj. Ne en antaŭaj proties manko de unikoda subteno. (3)

Windows-uzantoj interesataj elŝutu el <http://esperanto.pt/dok/ptlu1-1.zip>, malpaku kaj rulu na *setup.exe*, kaj instalu kiel novan aldonan klavaron el sia Kontrolpanelo (sub Lingvaj kaj Regionaj Opcioj, sub Lingvoj, butonon pri Detaloj). Kutimaj portugaliaj *Windows*-instaladoj disponigas du klavarlegilojn — usonan kaj portugalian (kiujn kiujn eblas alternigi foje per *Alt+Shift*); tiun ĉi modifitan "*Português Latino Universal 1.1*" eblas aldoni kiel trian. Poste, se ĝi kontentigas, eblas entute forigi la aliajn.

Eblas uzi tiun ĉi klavatribuan modelon ĉe ne-*Windows*-komputiloj (4) kaj ĉe ali-lingv/land-aj *Windows*-klavaroj, sed necesas nove programi. ***Ancxjo***

(1) Kial ĉeestas en la kutima klavaro iuj neportugaliaj literoj kiel "ñ", "ú" aŭ "ÿ" sed ne ekz. "ê", "í" aŭ "ŵ"? Ĉar en 1992 teknike konsidereblis nur subteno de la normo ISO 8859-1 — posta universaligo de ISO 10646 (unikodo) ne motivis (bedaŭrinde) aldonon de pliaj sekklavaj kombinoj al la portugalia klavaro, male kiel okazis ekz. ĉe la t.n. Kanada Multlingva Klavaro.

(2) Eblas facile marki klavojn per porplasta skribilo.

(3) Cetere la generitaj karakteroj estas laŭlekte po unu el ĉiu tajpago: Ekz. U+0125 kaj ne U+0068 U+0302.

(4) Tre simila ekzistas linukse i.a. ĉe *X11* kaj *KDE*.

BULTENO:

Jen **korektoj por tajperaroj** de NB90 laŭ paĝo, kolumno, sekcio, kaj linio(j) (minuso indikas supren-sendon); plena listo en http://esperanto.pt/nb_xjusa.htm#korekt:

pĝ.	kl.	sk.	lin.	eraro	korekto
2	1	—	8	360 ekzempleroj	280 ekzempleroj
3	2	3	-1	pĝ.3	ĉisupre
4	1	2	4	2008 la	2008, la
4	2	—	14	au	aŭ
5	1	—	13	1992	1990.04, NB50:16
5	2	—	-8	ALVES,	ALVES (↗),
7	1	—	20	A ₄	A4
8	2	—	-1		
9	2	2	-1		
11	1	1	-1	subskribanto	subskribanto
12	1	1	13	semajno	semajno da esperanto
12	2	1	2	kongresaninoj	kongresetaninoj
12	2	3	1	nominicialo	nominicialoj
13	2	1	-13	Ekz.,	Jen,
13	2	1	-11	<i>Brown, the Xmas Tord</i> ”, aŭ io tia	<i>Hankey, the Xmas Poo</i> ”, el <i>South Park</i>
13	2	1	-10	AL13	AR13
14	1	3	6-7	de M ^a Luisa	de PEA-ano M ^a Luísa
14	2	1	-3	oktobro	septembro
14	2	2	-6	Dume	Dume,
14	2	2	-2	Google.ORG	Google.COM
14	2	2	3-4	kaademon»(?)«	akademion
15	2	2	2,8	QARLUÖ	QARLUQ

Krome, mankas tuta linio en la korektaro de NB 89 (pĝ.15: «8; 2; —; 1; portugliaj → portugaliaj»), kaj ĉiujn substrekaĵojn legu normalaj, senstrekaj. **red.**

BULTENO:

Sekve de alvoko en NB90:15, elektis **ne ricevi per poŝto** Nian Bultenon jam 21 asocioj, por kiuj sufiĉos retpoŝta sendo de (printebla) pdf-dokumentoj (aŭ eĉ nur de ligilo al ĝi). Kompreneble tio ne esceptigos tiujn membrojn je iama ricevo de papera ekzemplero permane, sed ebligas ŝpari ekspedkostojn. **red.**

BULTENO:


Malnowajn numerojn*

Haveblas rete nove kreitaj pdf-versioj de malnovaj numeroj de *Nia Bulteno*: jam tri (n-roj 1, 17 kaj 70) kaj laŭplane iam ĉiuj plu mankantaj (2-16, 18-69 kaj 71-79). Memorigindas ke de post 2002.10 (ekde nia n-ro 80), rutine disponiĝas retpaĝe pdf-versio de ĉiu preta numero. La nove havebligitaj numeroj estas tamen nure skanitaj paĝbildoj, arigitaj en oportuna pdf-“vesto” kun pikselo, ne karaktra, teksto — do eblas tiujn legi homokule, sed ne selekti aŭ serĉi.

<http://esperanto.pt/dok/nb001w.pdf>
<http://esperanto.pt/dok/nb017w.pdf>
<http://esperanto.pt/dok/nb070w.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb080.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb081.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb082.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb083.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb084.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb085.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb086.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb087.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb088.pdf>
<http://esperanto.no.sapo.pt/nb/nb089.pdf>
<http://esperanto.pt/nb/nb090.pdf>
<http://esperanto.pt/dok/nb091.pdf>

Urloj iam koheros. **red.**

(*) Dosiernome "w" indikas malpezan dokumenton, taŭgan por ekrana lego; atingu pli detalan version por surpaperigo ĉe urlo sen ĝi.



26 jarojn post *Etaj Rakontoj* revenas
Eduardo NOVEMBRO!

Jen ***Liberaj Tempoj:***
rakonto pri la ĉiutaga laborista vivo

Plia originala esperanta prozo el Portugalio!

Vendprezo en la P.E.A.-sidejo: **16,00 €****
123 paĝoj; 207×149×8 mm³; 170 g
eldonis **La Karavelo**, 2010
ISBN: 978-989-96312-2-9



33½%-rabato je kuna aĉeto de
Etaj Rakontoj (2-a eld. baldaŭ elĉerpita!)*

http://cindymckee.com/librejo/Liberaj-Tempoj_diskoniga-versio.pdf

**mendkodo: 08.176

*Valida dum stoko haveblas; mendkodo: 08.025 *Etaj Rakontoj* Eduardo NOVEMBRO. ISBN: 972-9471-04-5. 129 pĝ.; 170×120×18 mm³; 140 g. P.E.A. 1986. **8,00 €**

Esperanto 2011-2012 Cursos na sede, em Lisboa

Rua Dr. João Couto, 6-r/c A; 1500-239 Lisboa (junto ao Fonte Nova)

Contatos: lernado@esperanto.pt ou 217 141 359

Três níveis, 24 aulas semanais* de 90 min.,
de 2011.11.05 a 2012.05.26. (pós-lab. ou f.d.s.)


1.º nível (sem conhecimentos prévios)

2-a nível (antaŭekzameno dum R.P.E.)

3-a nível (antaŭekzameno post R.P.E.)

O custo da inscrição (30,00 €) inclui todo o material, com desconto de 15% para sócios.

* Os horários de cada turma serão determinados de acordo com as disponibilidades de horário dos participantes. Prevêm-se grupos pós-laborais e/ou de fim de semana.



GOOGLE/TELE ATLAS



KARISEA